


1980 majo
73-a jaro
n-ro 893(5)

aperas monate (escepte de aŭgusto)


esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



estrara
raporto
1979/80



Membroj:
enestas
voĉdonilo!

Vi trovos

ĉefe la Raporton de la Estraro en ĉi tiu numero. Juĝu ĝin mem, sen nia antaŭ-recenzo ĉi tie. Ni scias, ke ekzistas inter niaj legantoj "tiuj, kiuj ne interesiĝas pri la oficialaĵoj", kiel dirus Gianfranco Molle. (Se vi ne interesiĝas pri raportoj, vi tiam devus havi intereson pri kanzonoj en Esperanto, kaj vi do devus scii, kiuj estas Molle, Le Puil, Marĉela, Tzaut ktp). Kion ni do faru pri "tiuj, kiuj. . ."? Ni ne scias. Se vi scias, diru! Helpu! Kion fari por la movadanoj, kiuj ne interesiĝas pri la Movado, pri la esperantistoj, kiujn ne interesas Esperanto kaj ĝia progreso? Feliĉe, estas iom da bildoj en la numero. Eble tio helpos! Enestas ankaŭ voĉdonilo por ĉiuj individuaj membroj de UEA, unuafoje tia ĝenerala voĉdono pri la komitatanoj. Bele, ĉu ne? Demokrate.

La ĉefartikolo pri nekrologa temo postulis de la redaktoro dividlinion inter liaj jugoslaveco kaj movada funkcio. Estis malfacile, tre. Ĉu li sukcesis?

Enhavo

- 81 Morto de la jugoslavia prezidento Josip Broz Tito: Neŭtraleco estas pontoj, ne muroj (Simo Milojević)
- 82 Tito pri Esperanto (kolekto de citaĵoj)
Interpopola komunikado: Rezisto psikologia (Claude Piron)
- 83 Landa agado: Io okazas en Hinda Unio (Probal Daşgupto)
- 84 Ĉinoj en Stokholmo
- 85 Universala Esperanto-Asocio: Raporto de la Estraro pri la agado dum la laborperiodo 1979/80:
Enkonduko; Ĝeneralaj; Administrado
- 86 Financoj
- 87 Institucio Hodler '68; Revuo; Kongresoj
- 88 Informado
- 89 Eksteraj rilatoj
- 90 Kulturo kaj edukado
- 91 Junulara sekcio (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)
- 93 Landa kaj faka agado
- 94 Esploro kaj dokumentado; Finaj vortoj
- 95 Financaj aldonajoj al la Raporto:
Spezoj por la jaro 1979
- 96 Bilanco de UEA je la 31a de decembro 1979
- 97 Spezoj de la 63a Universala Kongreso de Esperanto en Varno (1978)
Spezoj de la 64a Universala Kongreso de Esperanto (Lucerno, 1979)
- 98 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 100 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
Anoncetoj

La kovrilo

Jen denove tiu nia tradiciiganta kovrilo kun recikligitaj fotoj. Ni uzis ilin en la revunumeroj aperintaj dum la jaro pri kiu parolas la Estrara Raporto. Inter la kovrilaj vizaĝoj vi verŝajne rekonos almenaŭ kelkajn. Ni recikligas kovrile ankaŭ plurajn estraranojn. Kial ne? Cetere, tio ĉi eĉ estas la jaro kiam UEA — devige laŭ la nova Statuto — recikligos ne nur la Estraron sed eĉ la prezidanton mem. Bele, ke ni komencis tiel serioze, statute, zorgi pri la media purigo de la Movado, forĵetante (Pardonu!) la malnovajn funkciulojn kun eluzitaj ideoj. Sed, fakte, ne temos verŝajne pri la forĵeto. Vi scias, la recikligo donas novajn produktojn el la malnovaĵoj. Ni jam aklamis la ideon, ke la nuna prezidanto pretas resti en la Estraro. Ĝuste tia sinteno donas la esencon al la recikligo. Brave! Se ĉio ĉi efektive okazos en Stokholmo, ĝi estos la plej klara signo, ke unu el la plej gravaj bataloj de la du Tonkin-aj estraroj atingas plenan venkon. Paciencon. Stokholmo proksimas. Ni vidu, kio recikliga okazos tie.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 91 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj eksteraj rilatoj: d-ro Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce St., Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 382-5874.

Vicprezidanto: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., Britio, FK14 7HG; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; telefono (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-822 Miłanówek, Pollando; tel. (22) 58 37 08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Neŭtraleco estas pontoj, ne muroj

LA KVARAN DE MAJO kaj dum pluraj postaj tagoj, la ĉefnovaĵo en ĉiuj amaskomunikiloj tra la tuta mondo estis la morto de la jugoslavia prezidento Josip Broz Tito (1892-1980). Malfacilas memori multajn aliajn eventojn, kiuj en la lastatempa historio de la homaro fariĝis tiel totale tergloba temo. Por momento almenaŭ, tiu novaĵo sukcesis ignori ĉiujn politikajn, ekonomiajn, kulturajn kaj lingvajn barojn de la dividita mondo. Pli ol sepdek ŝtatoj proklamis funebbron dum unu, tri aŭ sep tagoj. Cento da ŝtatestroj kaj ĉefministroj ĉeestis la entombigan solenaĵon, la 8an de majo, kaj versajne tuta miliardo da homoj vidis ĝin en siaj televidaj programoj. Tamen, ĉi tiu gazeto ne estas loko por pli detale okupiĝi pri la kialoj de tiu tergloba atento al la forpasinto. Sed ni ja havas apartajn kaŭzojn por funebri la morton de Tito, ĉar ankaŭ ni devus senti nin orfaj pro la perdo de eminenta apoganto.

Antaŭ dudek sep jaroj, ĉi tiu revuo en sia numero por julio/aŭgusto 1953 (p. 221), sub jubila titolo "Marŝalo Tito, Esperantisto!", raportis pri la aŭdienco, kiun ĉe la prezidento Tito havis la 4an de junio tiujare kvarpersona esperantista delegacio (I. Borovečki, V. Jovanović, M. Stuttard, P. Zlatnar). Tito tiam surprizis la delegacion per du frazoj en la Internacia Lingvo: "Mi ĉion komprenis. Mi lernis Esperanton en la malliberejo".

Al tiu aŭdienco ligiĝis tra la postaj jaroj iom da movadaj mencioj pri la esperantisteco de la jugoslavia prezidento. Tito plurfoje liveris novajn pruvojn pri siaj ligoj kaj simpatioj al la Internacia Lingvo. Li poste kelkfoje akceptis delegaciojn de jugoslaviaj esperantistoj. Li estis la alta protektanto de jugoslaviaj Esperanto-kongresoj kaj li honoris sammaniere la 58an Universalan Kongreson en Beogrado en 1973. En marto 1977, parolante antaŭ kunveno en sia naskiĝloko Kumrovec (Kroatio), Tito spontane reemfazis sian esperantistecon, dirante, ke li siatempe serioze studis lingvojn, "unue Esperanton, kaj poste aliajn".

Rigardu la nekompletan kolekton de la deklaroj de Tito pri Esperanto (paĝo 82). Ĝi estas impona, nombre kaj enhave. La movada historio ne konas pli imponan kolekton de favoraj eldiroj de homo kun staturo de tia historia graveco. Kio aparte surprizas estas la fakto, ke tiuj deklaroj, malgraŭ sia aĝo, ankoraŭ restas plene aktualaj. Ili ne enhavas nur la kutimajn salutajn afablaĵojn kaj ĝentilaĵojn. Ili estas esencaj. Ili plue konsistigas fortikan bazon por la strategio de la Esperanto-movado. Tiajn eldirojn povis fari nur homo bone konatiĝinta kun Esperanto kaj ĝiaj idealoj, nur homo, kiu mem estis esperantisto. Kaj Tito do tio estis.

La Movado, ial, neniam multe utiligis la informan kapitalon, kiun prezentas la deklaroj de Tito. Kun escepto de jugoslaviaj esperantistoj, la Movado ne klopodis varti la ligojn inter Tito kaj Esperanto. Ĉu UEA ekzemple iam post tiu aŭdienco en 1953 sendis al Tito eĉ simplan afablaĵon en formo de naskiĝtaga saluto aŭ simile? Cetere, tiu artikolo en 1953 aperis sur la 13a



paĝo de la revunumero, post la tiutempaj "Loke — Fakte — Persone" kaj kongresa komuniko. Kial tia loko? Ĉu pro timoj pri malobservo de la movada neŭtraleco? Eble en 1953 tiu singardemo eĉ estis signo de necesa prudento. Sed nun, en 1980, ĉi tiu teksto ne okupas la ĉefartikolan lokon pro la fakto, ke la redaktoro hazarde estas jugoslavo. La teksto troviĝas ĉi-loke, ĉar tio estas la adekvata loko por ĝi. Ĝuste la internacia rolo de Tito estas leciono por ni en la Esperanto-movado, ke la neŭtraleco ne konsistas el muroj, kiuj malhelpas kontaktojn, sed ke ĝi plej konvene realiĝas en la kreo de ĉiudirektaj pontoj, kiuj ebligas kontaktojn. La esperantisteco de Tito postulas fundan priesploron, ne ĉar ĝi estus duba, sed ĉar ĝi meritas pli da doku-

mentiteco.* Strategian gravecon por la Movado havas ankaŭ esploroj pri alia trajto de la personeco de Tito: Li estis unu el la plej laŭtaj voĉoj por la rajtoj de la malgrandaj popoloj, kio inkluzivas la rajtojn de iliaj lingvoj kaj kulturoj.** Tito estis internacie rekonita batalanto por "nova monda ordo", kio do inkluzivas ankaŭ nian movadan batalon por nova monda ordo en la internacia komunikado.

Per la morto de Tito la internacia Esperanto-movado perdis la plej eminentan apoganton, sian efektivan Altan Protektanton. Mortis unu el ni — la esperantisto Josip Broz Tito. Konsole sonu la informo, ke la nova prezidanto de la Prezidentaro de Jugoslavio, Lazar Koliševski (1914-), lernis Esperanton antaŭ la Dua Mondmilito kaj tre verve propagandis ĝin, kiel aktivulo en la laborista Esperanto-societo de Beogrado.

Simo Milojević

* La baza teksto — "Mi lernis Esperanton en malliberejo" de P. Zlatnar — aperis fine de la libro *Josip Broz Tito; Biografiaj notoj*, de Vladimir Dedijer. Ljubljana: Slovenia Esperanto-Ligo, 1954. 518p. 21cm. La libro elĉerpiĝis, sed oni aŭdas pri planoj de la sama eldonejo publikigi baldaŭ la daŭrigan volumenon de Dedijer pri Tito. Krome, en Jugoslavio pretiĝas alia Esperanta libro pri Tito. Ĝi enhavos apartan artikolon pri lia esperantisteco.

** Vidu la librojn: *Tito kaj la nealiancisteco*, de R. Petković. Sarajevo: Esperanto-Societo, 1977. 40p. 20cm. 3,90 gld. kaj *La nealiancisteco — konscienco de la homaro*, de J.B. Tito. Sarajevo: Esperanto-Ligo de BkH, 1979. 97p. 20cm. 5,30 gld. Haveblaj ĉe la Libroservo de UEA.

INTERPOPOLA KOMUNIKADO:

Rezisto psikologia

Komence de aprilo Piron prelegis en Bruselo pri "La psikologia rezistado al Esperanto". Kiel li mem skribis, tio ĉi, "teorie, devus esti resumo de tio, kion mi diris en Bruselo. Sed ĉar mi verkis la resumon, laŭ peto de la organizantoj, eble tri monatojn antaŭ ol verki la tekston mem de la prelego, ne plu restas multo komuna inter ĉi tiu 'resumo' kaj tio, kion mi efektive diris." Nu, ne gravas tiu komuneco por ni. Gravas tiu kun la aliaj tekstoj de Piron. Ĝi ĉiam pli kaj pli trudas la opinion, ke Piron estas la plej bona advokato, kiun la Movado nun havas.

EKSTERTERANO veninta ĉi-planeden esplori pri lingva komunikado diagnozus ĉe la teranoj seriozan neŭrozon. Ili ja disponas, por komuniki facile kaj egalece de unu lingva zono al alia, tre kontentigan ilon — Esperanton — sed la plimulto suferas pro psikologia blokado kontraŭ ĝi. Tiel uziĝas ĉiuj klasikaj "defendmekanismoj de la egoo": **raciecigo** (oni pravigas aprioran starpunkton per pseŭdoraciaj argumentoj

Tito pri Esperanto

"EN LA HODIAŬA Batalo por la mondpaco, kiu anticipas proksimiĝon kaj evoluigon de plej multflanka kunlaboro inter ĉiuj landoj, senrigarde al la sociaj sistemoj de unuopaj ŝtatoj, konsiderinda rolo apartenas ankaŭ al la Esperanto-movado. Aparte signifas kontribuon de Esperanto povas esti en la evoluigo de la kultura kunlaboro, ĉar, interalie, tiel kreiĝas kondiĉoj ankaŭ por la politika, ekonomia kaj ĉiu alia kunlaboro, kiun hodiaŭ alstrebas ĉiuj progresemaĵoj kaj pacamaĵoj fortoj en la mondo."

* * *

"MI OPINIAS, ke la lernado de Esperanto nun estas tre aktuala. Ĝin oni ellernas multe pli facile, ol iun ajn alian lingvon. La scion de Esperanto oni povas uzi en ĉiuj landoj. Mi scias, ke Esperanto estas aparte disvastiĝinta inter la laboristoj. Por ili ĝi havas specialan signifon. Pere de Esperanto la laboristoj povas facile starigi kontaktojn kun la laboristoj en aliaj landoj."

* * *

"ESPERANTO devas esti enkondukita en la lernejojn, ne tamen per ia dekreto de supre, sed per konscia postulo de la publika opinio, do de malsupre, laŭ vere demokrata maniero."

* * *

"LA IDEO de Esperanto, kompreneble, havas ĉiam malamikojn inter la reakciuloj, precipe inter la ekstrema reakciularo."

* * *

"MI OPINIAS, ke Esperanto povas multe kontribui al la realigado de la celoj de Unesko kaj ĝenerale al la proksimiĝo de la diversaj popoloj. La egalrajteco, unu el la bazaj konceptoj de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, devas validi ankaŭ pri la demando de la lingvo. La grandaj popoloj klopodas trudi al la malgrandaj siajn lingvojn. Hodiaŭ en la mondo tre multaj homoj parolas ekzemple la anglan lingvon, sed tio ne havas ajnan ligan kun la demando pri internacia lingvo. Esperanto, aliflanke, estas neŭtrala; ĝi havas universalan karakteron."

* * *

"MI ESTAS KONVINKITA, ke la Esperanto-movado en nia lando ankaŭ estonte evoluos kaj ke daŭre kreskos la nombro de ĝiaj apogantoj kaj aktivaj membroj, precipe en la vicoj de la junularo."

REDAKCIA NOTO: La citaĵoj estas nia traduko laŭ la broŝuro *Tito o esperantu* (Tito pri Esperanto), Sarajevo 1974. Tre verŝajne ĉiuj eldiroj ligiĝas al la aŭdienco en 1953 (v. p. 81) kaj al letero al la 17a Kongreso de Jugoslaviaj Esperantistoj en 1958.

anstataŭ studi, kiel la solvo "Esperanto" funkcias tie, kie ĝi estas aplikata), **neado** (oni taksas la problemon neserioza, kvankam Babelo ĉiujare forrabas miliardojn da frankoj ĉe la impostpagantoj kaj ĉe l' konsumantaro), **projekcio** (oni sen prava motivo atribuas al Esperanto senkulturigan rolon, ne vidante, ke la vera kultura buldozo estas la degenera lingvaĵo angla-usona, kiu plagas la tutan mondon hodiaŭ) . . .

Esperanto do timigas. Estas vere, ke ĝi minacas al diversaj privilegioj (prestiglingvaj nacioj, grupoj socie



La mondo estas dividita en popolojn, sed Esperanto pontas la dividon per flua konversacio inter diverspopolanoj.

favorataj), al intelekta inercio ("se tiu lingvo fariĝas ĉie alprenita, mi devos lacigi mian cerbon por ĝin lerni"), al la erariga bildo de mondo perfekte orda ("la homaro estas dividita en popolojn, ĉiu kun la propra lingvo; kio estas tiu senpopola lingvo?"), al sekuriga izoleco (kiel aliaj bariloj, la lingvaj celas protekti, i.a. kontraŭ la risko, ke oni renkontu la ceterajn kulturojn tiel rekte, ke oni ne povus eviti ŝanĝi pri multo sian vidpunkton).

Sed Esperanto estas sentata ankaŭ, plej malprave, kiel agresanta la homon ĉe la koro mem de ties identeco ("mia lingvo estas mia animo; aserti, ke konvencia lingvo havas la samajn — eĉ pli bonajn — kvalitojn ol ĝi, estas insulti min") kaj en la bone edukita familio de la homaj lingvoj, ĝi aperas kiel aĉa bubo, ĝenanta, ĉar li diras la veron: "Vi kulturoj kaj etnoj diras, ke vi volas dialogi inter vi, sed ĉu estas vere? Vi disponas

por tio praktikan rimedon, kaj vi agas, kvazaŭ ĝi ne ekzistus . . ."

Krome, la meza terano ne imagas, kiel kompleksa la problemo estas. Li reduktas vastan kampon, kie interplektiĝas ĉiaj faktoroj el la sferoj lingvistika, fonetika, politika, pedagogia, ekonomia, kultura kaj socia al ridinde simpligita demando, kiun drinkeja konversacio povas solvi en du minutoj. Kaj li defendas sian emocion starpunkton per argumentoj, kiujn li ne havis la tempon pesi, ekz. "Esperanto estas terura miksaĵo", dum lingva analizo montras, ke multaj lingvoj — i.a. la angla — estas malpli homogenaj ol ĝi, aŭ "ĝi estas facila, sekve ne havas valoron", kvazaŭ facileco estus malavantaĝo por komuniki, kion kontraŭdiras ĉiuj studoj pri interfremdula komunikado.*

Tiel, anstataŭ agi kiel respondecaj plenkreskuloj, kapablaj fronti al problemo kaj elpensi al ĝi solvon, la teranoj kondukas sur la kampo de interpopola komunikado kiel timblindigitaj infanoj, preferantaj flankvojan iradon, penigan kaj multekostan, al rekta kurso, kies granda humana valoro multfoje pruviĝis. Ĉu masohismo? Sendube. Sed ĉe multaj ankaŭ vanteco. Rekte interkompreniĝi per Esperanto ja povas iu ajn. Tiuj, kiuj havas la povon decidi pri lingva komunikado ne volas esti "iu ajn". Surmeti aŭdilojn, disponi sklavojn, kiuj obee tradukas ion ajn skribitan aŭ diratan, profiti je lingva buĝeto multmiliono, ĉu tio ne signifas gravulon, ĉu tio ne pravas, ke "mi estas Iu"?

Claude Piron

* Ĉu la metra sistemo havas malpli da valoro ol la aliaj peskaj mezur-sistemoj, ĉar ĝi lerniĝas kaj uziĝas pli facile?

LANDA AGADO:

Io okazas en Hinda Unio

PRI HINDA UNIO, lando kun ĉ. 20 literaturaj lingvoj kaj ĉ. 1 000 parolaj lingvoj, oni jam de longe pensis, ke tie aparte necesas drasta solvo de la lingvo-problemo. De tempo al tempo diversaj hindoj ja interesiĝis pri Esperanto. Madeleine Haudebine pasigis tie pli ol jardekon. Sed temis pri malgrandskalaj klopodoj en specifaj partoj de Hinda Unio. Neniam eblis samtempe, kunordige, krei movadajn kernojn en pluraj lingvo-regionoj. Nun, fine, ni vidas samtempan interesiĝon pri Esperanto en diversaj ŝtatoj de Hinda Unio. La anoj de tiuj kernoj komencas serioze aspiri al tuthinda, organizita movado. Montriĝas ankaŭ kelkaj problemoj, kiujn komune havas ĉiuj el la hindaj Esperanto-grupoj. En Kalkato, metropolo en la orienta parto de Hinda Unio, agadas Swaraj Chakravarty, kiu vaste informas pri Esperanto en la gazetaro, distribuas informajn kaj lingvolernajn materialojn, kaj komencis starigi en

Se vi estas individua membro de UEA, kotizanta por 1980, kun ĉi tiu revunumero venas al vi voĉdonilo pri elekto de komitatanoj B. Atentu la limdaton de la voĉdono!

sia ŝtato (Okcidenta Bengalio) iom organizitan grupon. Ĉiu loka grupo funkcias ĉirkaŭ gvidanto, kiu iom pli scias la lingvon ol la aliaj grupanoj. Malpli regule ol tiuj lokaj grupoj kunvenas en Kalkato la centra grupo, konsistanta el tiuj gvidantoj. Unu el la fokuso de la informa laboro estas la kulture grava urbo Nabadwip, kie la ĉefa loka gazeto *Nabadwip Barta* jam aperigis multajn artikolojn pri Esperanto kaj verŝajne aperigos baldaŭ korespondan kurson.

Sendepende de s-ro Chakravarty, sed nun kunlabore kun li, la centro de la Junulara Pupteatro en Kalkato laboras por Esperanto. Ĝi lanĉis en aprilo Esperanto-kurson, pro iniciato de la sekretario, s-ro S.K. Biswas, kiu en oktobro vizitis la Pupteatran Internacian Festivalon en Zagrebo (Jugoslavio) kaj mem eklernis la lingvon.

En la norda parto de la lando, Tuthinda Esperanto-Societo (prezidanto S.M. Naqvi) kaj Hinda Instituto de Esperanto (prezidanto S. Mahant) estas du grupoj en la unia ĉefurbo Nova Delhio. Lastatempe oni ekhavis kontakton ankaŭ kun J. Jyoti en Nova Delhio, kiu interesiĝas pri la ebleco fondi TEJO-filion.

En la sudo, P.R. Ranga Nayakulu en Andrapradeŝo starigis klubon, kion faris ankaŭ la lingvistika profesoro d-ro F.S. Abdul Salam en universitato en Maharastro. Ges-roj Nath faris multajn klopodojn en Bangaloro, Karnatio, sed ili lastatempe ofte estis en eksterlando kaj ni ne havas freŝajn informojn de ili.

Pri la centra regiono aparte menciindas la agado de M.A. Vyas kaj R.N. Dubey, ambaŭ en Madjapradeŝo. S-ro Vyas lanĉis Esperanto-gazeton *Bonbela* kaj, kunlabore kun la hinda esperantisto Yashovardhan (en FR Germanio) kaj la sviso Walter Kobelt (kiu iom scipovas la hindian), verkis la informilon

Esperanta-hindia lingvogvidilo. S-ro Dubey, kiu estas lernejestro, komencis instrui la lingvon en sia lernejo.

La komunaj problemoj de ĉiuj el la menciitaj grupoj kaj agadoj estas ĉefe jenaj:

1) Mankas vere spertaj sciintoj de la lingvo. La grupoj multe pli dependas de la lingva kaj materiala apogo el aliaj landoj, ol okazus, se en la loka movado troviĝus spertaj esperantistoj. Fakte ja ekzistas iuj spertaj esperantistoj en Hinda Unio, ekzemple d-ro Aŝvinikumar' en Uttarpradeŝo, kiu lernis la lingvon en la sesdekaj ja-

Ĉinoj en Stokholmo

LAŬ ĵus ricevita informo el Pekino, al la 65a UK en Stokholmo venos 8-persona delegacio de Ĉina Esperanto-Ligo, kies aliĝpeton la Komitato de UEA traktos en Stokholmo. La delegacion gvidos la mondfama verkisto Bakin, malnova esperantisto kaj movada aktivulo. Antaŭ la Kongreso aperos Esperanta traduko de unu el la verkoj de Bakin, antologieca kolekto de la poeziaj tradukoj de S.J. Zee kaj silke teksita portreto (40x27cm) de Zamenhof. Delegacio de ĈEL iros ankaŭ al la Dua Pacifika E-Kongreso en Vankuvero (Kanado).



Ankoraŭ nur izolaj movadaj aktivecoj en la vastega lando: M. Haudebine antaŭ Kutab Minar en Nova Delhio (1960)

roj, kaj A.B. Halder, kiu lernis Esperanton de Lakshmiswar Sinha (1905-1977), la pioniro en Okcidenta Bengalio. Sed mankas kunordigo inter la spertoj de tiaj unuopuloj kaj la nuntempa movado de entuziasmoj, relative senspertaj. Parte, la problemoj estas ankaŭ tio, ke temas pri vasta lando kun ne tute glataj komunikrimedoj. Krome, la movado tie ankoraŭ ne havas la finanĉan kapablon memstare vivteni sin kaj sisteme mendi helpon de spertuloj, ĉu el, ĉu de ekster Hinda Unio.

2) Pli ĝenerale, la hinda movado altiras multe pli da informpetoj kaj petoj starigi kursojn, ol la aktivuloj kapablas plenumi. Ilin limigas la malalta ĝenerala vivnivelo en la lando kaj la fakto, ke la rupio estas malforta valuto. UEA, per siaj Fondaĵo Azio-Afriko kaj Propaganda Konto, sisteme flegis la kontaktojn kun Hinda Unio kaj provizis la tiean movadon per lerniloj kaj informiloj. Tamen, tiu solvo estis nur provizora, adekvata nur al la naskiĝbezonoj de la grupoj. Nun, ĉar Fondaĵo Azio-Afriko estas en kriza stato, UEA komencis turni sin al aliaj Esperantaj organizaĵoj kaj eldonejoj, por ke ili senpere helpu al la hinda movado.

Kompreneble, la efektiva solvo venos nur, kiam la hindoj produktados siajn proprajn informilojn kaj lernolibrojn en hindaj lingvoj kaj ne plu bezonos dependi de ekstera helpo. Aliflanke, por ke tio okazu, necesas unue produkti movadon gvidatan de spertuloj. Necessas iom da tempo por ke iuj el la movadanoj fariĝu spertuloj. Dum ĉi tiu tempo, la helpo el landoj kun organizita Esperanto-movado estas nemalhavebla. Kiel organizi tiun helpadon, tio restas grava demando.

Probal Daŝgupto

Raporto de la Estraro

pri la agado dum la laborperiodo 1979/80

1. ENKONDUKO

ĈI TIU RAPORTO traktas la laborperiodon inter la 1-a de aprilo 1979 kaj la 29a de februaro 1980. Temas ĉi-foje pri 11 monatoj, ĉar oni celas iom-post-iom atingi, ke la raportperiodo koncernu difinitan kalendaran jaron, kiel jam okazas kun la financoj de la Asocio. Laŭ komitataj diskutoj en Lucerno, la Raporto ne listigas tro da detaloj — ilin oni trovas tra la jaro en ĉi tiu revuo — sed klopodas doni superrigardon pri la laboroj. Tio devus ebligi komparojn inter la intencoj kaj rezultoj, kaj montri, kie restis demandoj ne solvitaj. Oni devus memori tion ankaŭ dum la Unua Ĝenerala Kunsido en la Universalaj Kongresoj, ĉar la tiea pritakto de la Estrara Raporto ofte perdiĝis en detaloj, kaj ne sukcesis pli funde ekzameni la ĝeneralan agadlinion de UEA. Ĉar tiu kongresa kunsido estas pli-malpli la sola ebleco de fizika dialogo inter la membraro kaj Estraro, necesas zorgi, ke ni bone utiligu ĝin. Kiel pasintjare, ankaŭ ĉi-foje la Raporto iras al ĉiuj membroj de UEA, do inkluzive la ne-abonantojn.

2. ĜENERALAĴOJ

(1) **Statuto kaj Regularoj:** UEA havas nun novan Statuton, aprobitan per Ĝenerala Voĉdono, kiu finiĝis la 11-an de januaro 1980, kaj bazitan sur propono de la Komitato. En la Ĝenerala Voĉdono estis esprimitaj 25 272 el la eblaj 31 190 voĉoj en la Asocio, kaj la nombro de jesaj voĉoj pri la unuopaj paragrafoj variis inter 23 979 kaj 25 271. La nova Statuto aperos en la Jarlibro 1980. Intertempe eklaboris komisiono por revizio de la diversaj regularoj de UEA.

(2) **Honoraj Membroj:** La Komitato elektis kiel novajn Honorajn Membrojn sinon Emilija Lapenna (Jugoslavio) kaj d-ron Hideo Shinoda (Japanio).

(3) **Komitato:** En 1980 okazas novaj elektoj, ĉi-foje laŭ la preskriboj de la nova Statuto. La nombro de komitatanoj kaj observantoj antaŭ la elektoj estis 77.

(4) **Estraro:** Kunsidoj okazis en Rotterdam en aprilo kaj novembro 1979 kaj marto 1980. Krome okazis dek du kunsidoj dum la UK en Lucerno.

(5) **Komisionoj kaj komisiitoj:** En Lucerno la Komitato rekonsistigis plurajn komisionojn, malfondis tiun pri parlamenta agado, fondis novan por revizio de la regularoj kaj aprobis la konsiston de 9-persona komisiono en la kadro de la Konsilio pri Kulturo. La Estraro plue serĉas kandidatojn por nova komisiono pri komerco kaj industrio.

(6) **Laborplanoj:** La Estraro laboris laŭplane, laŭ sia Taskaro Prioritata. Ĉar la 3a Baza Laborplano de UEA el 1973 bezonas nun aktualigon, la Estraro havas la taskon ellabori proponon pri 4a Baza Laborplano. Tiu laboro komenciĝis dum la raportjaro. Ĝis la UK en Stokholmo devus esti preta unua diskutpropono.

(7) **Landaj kaj fakaj asocioj:** Pro la aliĝo de Ĉilia Esperanto-Asocio kaj Portugala Esperanto-Asocio, la nombro de aliĝintaj landaj asocioj estis denove rekorda: 42 (nur 33 en 1974). Daŭre estis 3 aliĝintaj fakaj asocioj. Post subskribo de kontraktoj pri kunlaboro kun Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA) kaj Esperantista Go-Ligo Internacia (EGLI) la nombro de kunlaborantaj fakaj kaj neneŭtralaj organizaĵoj atingis 25.

3. ADMINISTRADO

(1) **Oficistoj:** La meza nombro de oficistoj kaj volontuloj salajrataj de la CO dum 1979 estis preskaŭ egala (9,3) al tiu de 1978 (9,5). Reale, tamen, la fortoj disponeblaj de la CO estis pli malgrandaj pro la partempa disponigo de laborantoj al la Grafika Centro en Antverpeno kaj al la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO. Novaĵo estas la unuafoja enoficiĝo de militrifuzanto, Huibert den Draak, kiu laŭ la nederlandaj leĝoj rajtas anstataŭe fari civilan servon ĉe institucio “laboranta por la ĝenerala utilo”. (Kiel tia estas nun rekonita ankaŭ UEA.) Li helpas forigi la mankon en la grafika fako kaŭzitan de la oficfino de Joan Guiñon (Hispanio). En la lasta parto de la jaro oficis ‘gaste’ ĉe la Libroservo dum kelkaj semajnoj Geoffrey Sutton (Svedio/Britio).

(2) **Volontuloj:** Problemojn spertis la Libroservo kaj KER de TEJO, kiuj inter si dividis unu volontulon dum parto de la jaro — aranĝo, kiu montriĝis ne-kontentiga. Krome mankis KER-volontulo dum pluraj monatoj, inter forveturo de Ian Tarrant al Kenjo kaj alveno de Sylvaine Bourrelly el Francio. Malgraŭ kelksemajna volontula servo de Jacques Lindau (Francio), ankaŭ la Libroservo longe malhavis volontulon, ĝis la alveno de Probal Daŝgupto (Hinda Unio) por 8-monata servo ekde januaro 1980. Aldone al pluraj malnovaj helpantoj — kaj la regula servo de Richrad Hirsch en Bad Hersfeld (FR Germanio) — sporade sed bonvene ‘volontulis’ ankaŭ Jim Cushing kaj Spomenka Štimec (Jugoslavio), Neven Kovačić (Jugoslavio), Albert Dekker (Nederlando) kaj Berit Posthuma (Svedio/Nederlando).

(3) **Domo:** Grandajn perturbojn kaŭzis la renovigo de la kompleta elektra drataro komence de 1979.

Sekvis konstruo de tutmura bretaro en la ĉambro 'Aŭstralio' (kunvenejo) kaj ĝenerala renovigo de la volontulaj loĝoĉambroj (Ĉambro Arabio, Sveda Ĉambro). Ankoraŭ restas pluraj ĉambroj riparendaj.

(4) **Mebloj kaj maŝinoj:** La ĉefaj elspezoj en 1979 por la roterdama oficejo estis por elektrona (brokanta) kontmaŝino kaj por novaj mebloj por la direktora oficejo (Ĉambro Minnaja). Tion parte ebligis escepte malavara kontribuado al la Fondaĵo Oficeja Ilaro.

(5) **Grafika Centro Antverpeno:** La Grafika Centro Antverpeno evoluis en tre mallonga tempo de nura kompostejo ĝis kompleta entrepreno kiu kapablas mem prizorgi presaĵojn de a ĝis z. Sole mankanta maŝino (reprokadero) por tion realigi estis ricevita donace komence de la jaro. Ĉefa kliento restis kiel kutime la Centra Oficejo. Aliaj gravaj klientoj estis la eldonejo TK/Stafeto, Flandra Esperanto-Ligo kaj kelkaj neesperantistaj firmaoj. La Centro disponis parte pri unu, parte pri du pagitaj oficistoj (P. Peeraerts kaj L. Jacques). Volontule krome laboris tuta aro da konstantaj helpantoj (Gerd Jacques, Anne Tilmont, Manuel Halvelik, Jan de Craeye, Frank Maertens, kaj, dum kvin monatoj, Nicole Verhelst) samkiel pluraj okazaj kunlaborantoj.

(6) **Membraro:** La lastaj ciferoj pri 1979 estas: asociaj membroj 24 593 (el kiuj 6 625 estas samtempe asociaj membroj de TEJO); individuaj membroj: 1 038 MJ, 3 940 MA, 983 DM, 18 HM, 123 MJ-K, 176 MA-K, t.e. entute 6 278 (en 1978: 6 222). La sumo de ĉiuj membroj estis do 30 871 (en 1978: 31 947).

(7) **Societo Zamenhof:** Tiu societo de financaj subtenantoj de UEA nombris 226 kotizintajn membrojn por 1979 (221 por 1978).

(8) **Delegitoj:** Aperis broŝureto *La Delegita Reto: Konsiloj por Delegitoj de UEA* (Konsilaroj pri Esperanto-Agado, n-ro 7). Al la ĝenerala ordigado kaj kontrolo de la delegita reto multe kontribuis la speciala komisiito Richard Hirsch (FR Germanio). La estrara intenco malfermi la delegitan servon al pli vasta publiko ne realiĝis, sed la Estraro daŭrigis la klopodojn por plivastigi kaj pliefikigi la delegitan reton. Laŭ la Jarlibro 1980, estas 1 210 delegitoj, 197 vicdelegitoj, 61 junularaj delegitoj kaj 2105 fakdelegitoj. Tio kune sumiĝas al entute 3 573 delegitaj funkcioj, kompare al 3 469 en la pasinta jaro, kaj 3 257 en la jaro 1977. La kresko okazis ĉefe en Argentino (+7), Brazilo (+34), FR Germanio (+41), Pollando (+10) kaj Usono (+21). Delegitoj nun ekzistas en 63 landoj (55 en 1977).

(9) **Jarlibro:** Unuafoje por la Jarlibro 1979 estis oficiale nomita redaktoro: Stefan MacGill. La Jarlibro jam atestas pri liaj klopodoj por sistemigi la enhavon kaj enmeti pli da utilaj informoj, mapoj k.s. La apero plifruigis je pluraj semajnoj kompare kun la antaŭaj jaroj, kaj dank' al aera ekspedo tra Londono preskaŭ ĉiuj membroj ricevis ĝin en junio.

(10) **Eldona Fakoj:** Aperis la suahillingva broŝuro *Kwa kulinda tamaduni za Afrika* (Por la defendo de

afrikaj kulturoj), kun financa helpo de Nederlanda Esperanto-Asocio. Krome UEA prizorgis laŭ kontrakto kun Unesko la eldonon kaj senpagan distribuon de la broŝuro *Unesko: kio ĝi estas, kion ĝi faras, kiel ĝi funkcias*. Longiĝis la laboroj super *Plena analiza gramatiko*, kiu aperos en unu 600-paĝa volumo en 1980. Aliaj eldonprojektoj (i.a. verkoj de Atanasov kaj Slanina) estis prokrastitaj pro manko de laborfortoj.

(11) **Libroservo:** La vendoj atingis novan rekordon: ĉ. 184 000 gld. La Kongresa Librostando en Lucerno atingis vendosumon de pli ol 35 000 gld. La aperigo de nova katalogo estis prokrastita ĝis 1980.

(12) **Biblioteko Hodler:** Ĝi restas plejparte nekatalogita pro manko de rimedoj kaj homfortoj. La Estraro esploras la eblecojn ricevi por ĝi subvenciojn de nederlandaj instancoj.

(13) **Varbado:** La CO mem ne entreprenis apartajn varbkampanjojn, sed pluraj landaj kotizperantoj atingis tre bonajn rezultojn, precipe en Brazilo, FR Germanio, Nederlando kaj Svislando.

(14) **Kotizperantoj:** Aldoniĝis nova peranto en Ĉilio (D. Alvístegui). En Svislando s-ino Cool-Côté transprenis tiun taskon el la manoj de Kurt Greutert.

(17) **Poŝtmarkvendado:** Rekordan rezulton (pli ol 4 700 gld.) donis la vendado de uzitaj poŝtmarkoj, kiun sindediĉe prizorgas la komisiito Fred de Geus. La CO daŭre akceptas donacojn de poŝtmarkoj, en ĉiu ajn kvanto. Apartan dankon al ĉiuj ĝisnunaj kontribuintoj!

(18) **Aŭtomatigo:** La Estraro principe decidis favore al aŭtomatigo de la administrado de la CO kaj alvokis kandidatojn por la ofico de programisto. Pluraj tiaj proponoj estas nun sub konsidero.



4. FINANCOJ

A. Spezokonto

(1) **Buĝeto kaj rezultoj:** La Estraro kaj la CO denove, kiel eble plej konsekvence, respektis la buĝetitajn limojn. Ĉe la elspezoj montriĝas gravaj diferencoj nur ĉe niaj propraj revuoj kaj la jarlibro, pro la sumo de nebuĝetitaj grafikaj kaj aliaj kostoj (same kiel en 1978), kiuj tamen aperas sub la grafikaj laboroj: do nur aŭ plejparte librotena ŝanĝo. Ĉe la enspezoj elstaras du gravaj favoraj diferencoj: kongresaj enspezoj

(+10 000) kaj ricevita rento (+18 000). Rimarkindas ankaŭ la altaj ciferoj de en- kaj el-spezoj, ekz. ĉe Grafika Centro Antverpeno. Ĉar ĝiaj spezoj estas preskaŭ en ekvilibro, iel kaŝiĝas la granda laborkapacito, pro la fakto, ke la kostoj enhavas ankaŭ ĉiujn salajrojn kaj kompensojn. La spezokonta diferenco inter la buĝetitaj kaj realaj kompensoj (14 400 gld.) estas granda, sed ĉefe rezultas el la fakto, ke la CO dum la jaro "vendis" laborfortojn al la Grafika Centro, KER de TEJO kaj Instituto Hodler.

(2) Konkludo: La buĝetitaj negativa saldo kaj eldono de nur 10 numeroj de la revuo *Esperanto* ŝanĝiĝis al pozitiva saldo kaj eldono de 11 numeroj, dank' al diversaj elementoj, sed speciale pro la multaj anoncoj en la revuo kaj la Jarlibro, daŭra subteno pere de la Societo Zamenhof, sukcesa kongreso en Lucerno, ricevita intereso kaj ankaŭ pro la donacoj al la Ĝenerala Kaso (10 196,11 gld.).

B. Bilanco

(1) Aktivoj: La monrimedoj malplialtiĝis per 146 659,22 gld., pro aĉeto de valorpapiroj (76 205 gld.) kaj plialtiĝo en la konto "debitoroj" (53 956,91 gld.). Pro la konsiderindaj donacoj al la Fondaĵo Oficeja Ilaro, ni povis aĉeti novajn meblojn kaj maŝinojn por la tri jam funkciantaj oficejoj en Roterdamo, Antverpeno kaj Nov-Jorko (plialtiĝo de la inventara valoro je 9 149,75 gld.).

(2) Pasivoj: Gravega falo de la rimedoj en la Propaganda Konto estas la plej atentinda fakto. Ĝi ŝuldiĝas al gravaj elspezoj por Esperanto-dokumentoj (13 en 1979), ĝisdatigo de *LPLP* (27 900 gld.), agado ĉe UN/Unesko (3 600 gld) kaj senpagaj libroj por evolulandoj (6 100 gld.). Aliflanke, pro la plialtiĝo de la Kapitalo Dumvivaj Membroj kaj legaco el la testamento de K. Schönrich (Wiesbaden, FRGermanio), la Asocia Kapitalo superas nun la sumon de 480 000 gld. Por kompari, en 1970 ĝi atingis la sumon de 231 103 gld, kio signifas, ke ĝi en la lastaj dek jaroj duobligis, kvankam tie necesas konsideri ankaŭ la inflacion.

5. INSTITUCIO HODLER '68

(1) Estraro kaj administranto: Ne okazis ŝanĝoj en la kvinpersona estraro, sed pro la eksigo de s-ro Lok la Estraro nomis novan administranton, V. Sadler. La rutina administra laboro estas nun farata en la Centra Oficejo de UEA.

(2) Subvencioj: El la rento de la kapitalo la estraro en 1979 distribuis 10 000 gld.: 3 000 por la oficeja ilaro de UEA; 2 000 por Fondaĵo Canuto; 2 000 por Eŭropa Esperanto-Centro en Bruselo; 900 al eldonejo Vulpo (Nederlando) por infanlibro; 660 cele al senpaga havebligo de *Pri internacia lingvo dum jarcentoj* (Dratwer) en evolulandoj; 500 al la Akademio de Esperanto; 500 al TEJO por ĝia Pasporta Servo; 440 al Ornitologia Rondo Esperantlingva por ĝia revuo *La mevo*. Per tio la sumo de subvencioj disponigitaj de la Instituto en la lastaj naŭ jaroj atingis preskaŭ 75 000 gld.

(3) Perspektivoj: Ĉar la rento ĉiujare estas disdonata en la formo de subvencioj, la kapitalo povas kreski nur per novaj donacoj aŭ pruntoj. Nuntempe ĝia sumo restas stabila je ĉ. 200 000 gld.

6. REVUO

(1) Redaktoro: Simo Milojević. Redaktoroj de konstantaj rubrikoj: B. Golden (Ekzameno E), I. Jackson (TEJO-paĝo), G. Larglantier (Esperanto en radio).

(2) Amplekso kaj enhavo: La jarkolekto 72 (por 1979) ampleksis 220 paĝojn. Kontribuis al ĝi ĉ. 90 aŭtoroj. Anoncoj okupis konsiderindan spacon en la jarkolekto, sed ili ankaŭ subtenis — tre forte — la financon de la revuo (pli ol 19 000 guldenoj).

Amplekse estis traktitaj la reorganizitaj landaj asocioj en Ĉinio kaj Soveta Unio. Atenton ricevis ankaŭ la movado en Brazilo, Ekvadoro, Hungario, Irano, Japanio, Pollando, Rumanio kaj Svislando. La revuo adekvate sekvis la intensecon de la eksteraj rilatoj de la Asocio (Eŭropa Agado, UN, Unesko, Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj). La 25a datreveno de la montevidea rezolucio pri Esperanto estis aparte markita per ampleksa studo en la decembra numero. Prinotitaj estis ankaŭ la centjaraj datrevenoj de pra-Esperanto kaj Volapuko. Spaco dediĉiĝis ankaŭ al Internacia Jaro de la Infano kaj la kongreslando de 1979, fakaj asocioj de fervojistoj kaj instruistoj, nova Statuto de UEA, 64a UK en Lucerno, Belartaj Konkursoj ktp. Aperis ampleksaj tekstoj pri la estonteco de la homa reproduktado kaj pri la neceso de edukado al tutmondeco. Helpe de siaj konstantaj rubrikoj (Recenzoj, Radio, Loke-Fake-Persone, Laste aperis... ktp) la revuo konservis sian reputacion de rapida kaj aŭtoritata informilo pri la novaĵoj ne nur en UEA sed ĝenerale en la internacia E-movado.

(3) Teknika prizorgo: Ĉion faris la CO en Roterdamo. Presis la firmao Tuijtel (Nederlando). Ekde novembro la titolojn fotokompostas la Grafika Centro en Antverpeno.

(4) Abonantaro, eldonkvanto: La sumo de abonantaj membroj, simplaj abonoj, kolektivaj kaj kongresaj abonoj estis iom pli ol 7 700. La eldonkvanto variis inter 8 600 kaj 10 300 (junio, sendita pro la Estrara Raporto ankaŭ al aliaj individuaj membroj).

(5) Ekspedo: La meza aperdato inter aprilo 1979 kaj januaro 1980 estis la 15-a de la monato en Nederlando. Aliaj eŭropaj landoj ricevis la revuon meze 10 tagojn post la apero, neeŭropaj (aerfrajte tra Londono) ricevis ĝin meze 23 tagojn post la apero, laŭ statistiko pri la numeroj de junio ĝis septembro. Rekta ekspedo el Roterdamo postulas por la tuta mondo meze nur 7 tagojn, sed la jara kosto estus ĉ. 20 000 gld. pli.

7. KONGRESOJ

La kongresa regularo karakterizas Universalan Kongreson kiel internacian manifestacion de la esperantistaro. Laŭ ĝi UK celas fortigi la solidarecon inter la esperantistoj, progresigi la Movadon kaj studi ĝiajn problemojn. La trajtoj de la kongresoj apenaŭ ŝanĝ-

iĝis dum la jardekoj. Nun estas diskutata — ĉefe en komisiona formo — la ebla plimodernigo de la Universalaj Kongresoj. La opinioj diferencas, i.a. pri la “foireca” karaktero, programa ŝtopiteco kaj pri altaj kostoj.

La 64a UK en Lucerno estis bone organizita. Aparte menciindas la pli ol tutjara sistema laboro de LKK.



Kurt Greutert gvidis la prepar-laborojn de la multilate tre sukcesa 64a Universala Kongreso en Lucerno (Svislando).

Kiel ĉefa temo estis traktita “La lingva aspekto de internacia organiziĝo”. Krom la kongresanoj esprimis siajn opiniojn ankaŭ invititaj neesperantistoj. Montras la favoran sintenon de la eksteruloj la fakto, ke dum la Inaŭguro festparolis R. Muller, sekretario de Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj. La reprezentanto de la Internacia Asocio de Interpretistoj, R. Glarner, venis al la Kongreso por sekvi la funkciadon de la Internacia Lingvo.

La Komitato, post 5-jara antaŭpreparo, akceptis la novan statutproponon de UEA. La celkonscia kaj disciplinita laboro de ĝiaj anoj ebligis, ke ĝi sukcesis findecidi pri ĉi tiu grava kaj komplika afero. El inter la estraraj decidoj elstaris la aprobo de la plano pri la malfermo de la Oficejo de UEA en Nov-Jorko.

En la kadro de la Internacia Somera Universitato estis 11 prelegoj. En Lucerno debutis ankaŭ novaj ISU-prelegantoj. La elektoebleco en la libroservo estis eksterordinare riĉa. La kulturaj aranĝoj abundis kaj estis multnombre vizititaj. La kongreslanda gazetaro raportis pri la evento. Svisa Radio Internacia ĉiutage elsendis en Esperanto dum la kongresa semajno. Gejunuloj pretigis informan materialon por la partoprenantoj de la samtempe okazinta internacia muzika festivalo.

Samtempe kun la UK okazis la 17a Internacia Infana Kongreseto. Partoprenis ĝin 24 infanoj el 12 landoj. La ĝenerala lingva nivelo estis escepte alta. La flua parolkapablo de infanoj bone impresis ankaŭ la eksterulojn.

Inter la fakaj asocioj, la kongreso de IFEF (fervojistoj) okazis en junio (Turku, Finnlando), tiu de LIBE (blinduloj) dum la UK en Lucerno, de KELI (kristanoj) en aŭgusto (Liestal, Svislando), kaj tiu de IKUE (katolikoj) meze de aŭgusto (Luksemburgo).

8. INFORMADO

(1) **Kunagantoj en la informlaboro:** La Komisiono pri Informado estis reestablita kaj ĝi kunsidis en Lucerno. Ĝi trovis pliajn kunlaborantojn por difinitaj taskoj. En la Estraro la fakon “informado” transprenis la ĝenerala sekretario, d-ro Bormann. Plue agadas informe ankaŭ la Centra Oficejo de UEA. Dum la raportaro informado fariĝis, kiel anoncote en la pasintjara Raporto, ankaŭ oficeja laboro: la Grafika Centro Antverpeno ricevis la taskon parte prizorgi la laborkampon. Ĉar ties gvidanto, s-ro Peeraerts, enoficiĝis nur pasintjare, tiu laboro komenciĝas nur nun. Menciindas, kompreneble, la landaj informaj fakoj aktivantaj pri informado nacilingve. Ĉio ĉi estas reto kun kvinopa bazo, kies rekonstruo promesas pli efikan laboron estonte.

(2) **Ĉefaj agadoj:** En la Komisiono estis traktitaj planoj, kiuj celis fiksi gvidliniojn por la estonta informa laboro de la Centro en Antverpeno. La Komisiono daŭrigis sian laboron koresponde post la UK, sed tio iom ekklamis en la postaj monatoj. La Centro en Antverpeno ekrilatis al siaj partneroj en la landaj asocioj. La CO en Roterdamo plenumis amason da unuopaj informpetoj, ĉefe el landoj, kie ne ekzistas organizita Movado, kaj s-ino Brennan produktis bultenojn de Internacia Gazetara Servo pri ĉiuj pli atentindaj novaĵoj. La bultenoj plue aperis en la lingvoj angla, franca kaj Esperanto.

(3) **Landaj informaj fakoj:** Laŭ raportoj de la landaj asocioj, pri informa laboro plibonigendaj estas ĉefe du aferoj. Dum en kelkaj landoj tiu ĉi laborkampo estis bone prizorgata, estas tamen ankaŭ landoj, eĉ kun organizita Movado, el kiuj pri la informa laboro apenaŭ io estas raportita, ĉar, supozeble, malmulto okazis. Tiu indiko kritike rilatas al iuj landaj asocioj, sed ankaŭ al UEA, ĉar ĝia kunordiga funkcio dum la raportaro devis intensiĝi. La Estraro estonte pli akcentos la helpajn eblecojn por la landaj informaj fakoj. Jam komenciĝis laboroj por povi disponigi modelan informan materialon. Ĝia kompilo eblas ĉefe per reciproka konatigo de varbiloj inter la landaj asocioj. UEA konscias pri sia devo gvidi komunajn kampanjojn, ĝi mem kiel stabo, kaj la landaj informaj fakoj kiel la fronto al la neesperantista publiko.

(4) **Eŭropa agado:** La informa laboro direktita al instancoj, politikistoj kaj publiko en la landoj de Eŭropa Komunumo elstaris pro siaj kvalito kaj konstanteco. Ĉefa alkroĉaĵo de tiu laboro estis la balotoj por Eŭropa Parlamento (meze de 1979), kies elektokampanjo estis vaste ekspluatita por atentigoj pri la lingva problemo de la Komunumo. La novelektitaj parlamentanoj tuj ricevis informojn pri Esperanto, ekzemple la germanaj la libron de Richard Schulz, *Europäische Hochsprache*, senditan de GEA. La laboroj de Eŭropa Esperanto-Centro, al kiu helpas UEA, povus esti pli efikaj se partoprenus ĉiuj koncernaj landaj asocioj, kaj ne nur, kiel vere statas la afero, kvin (el naŭ).

(5) **Informado okaze de la UK:** Dum la UK en Lucerno, laboris nur nacilingva Kongresa Gazetara

Servo. La nacia lingvo de la UK-urbo estis unu el la "grandaj lingvoj", la germana. Tial nacilingvaj informoj facile pluiris en la mondan informmerkaton. Evidentiĝis, ke Esperanto-Kongreso kiel tia ne alportas multon raportendan, ĉar la ĵurnalistoj atendas iel atentovekajn aferojn. Ni devos pli zorge eltrovi raportaĵojn, faktojn kaj okazintaĵojn, kiuj vere elvokas ĝeneralan intereson.

(6) Aliaj informaj agadoj: La elsendoj en Esperanto plimultiĝis pro la multobliĝo de la sendohoroj de Radio Pekino. Kiomgrade la radioelsendoj informas pri Esperanto-novaĵoj, tiom ili partoprenas en nia informagado. La Estraro esperas trovi pli da kompreno ĉe la naciaj radiokompanioj, ke sian celon — informi alilandanojn pri sia lando — ili atingos pli facile, se ili donos en la elsendoj lokon ankaŭ por movadaj novaĵoj. La raportoj alvenintaj montras, ke la informoj pri Esperanto multobliĝis ne nur en la gazetoj, sed ankaŭ en la radio kaj — pli grave! — televido. Ĉar en multaj socioj la televido fariĝis la ĉefa alportanto de la novaĵoj, la Esperanto-movado devas klopodi pri pli da atento flanke de tiu amaskomunikilo. Grava informlaboro estas multfoje farita dum sciencaj simpozioj aŭ konferencoj. La interesitajn homojn ni bone atingas ankaŭ per prelegvojaĝoj, agado por kiu la Centro en Antverpeno povus transpreni perado-rolon.

9. EKSTERAJ RILATOJ

(1) Unuigintaj Nacioj: La rilatoj ricevis novan impulson jam fine de 1978, kiam estis starigita en Nov-Jorko speciala laborgrupo por ilin prizorgi. Pro daŭra plifortiĝo de tiu grupo, la Estraro decidis starigi oficejon de UEA en Nov-Jorko. Tiu oficejo, kiu troviĝas en

moderna konstruaĵo trans la strato de la Domo de UN, komencis sian agadon en decembro 1979, sub la direktoreco de s-ino Jackie McAloon. Ĝi nun lanĉas ampleksan programon de kontaktoj kaj interkonsiliĝoj kun UN-funkciuloj, naciaj misioj kaj neregistraj organizaĵoj ligitaj al UN. Jam aperis ampleksa artikolo pri ĝia agado kaj la celaro de UEA en la interna periodaĵo de la UN-sidejo, *Secretariat News*. Komenciĝis ankaŭ kurso por UN-oficistoj. La 20-membra laborgrupo kunvenas ĉiumonate kaj respondecas pri la agadpolitiko de la oficejo. Ankaŭ 8-membra administra estraro regule kunsidas sub la gvido de la prezidanto de UEA. En 1980 finansas la oficejon subvencio de 20 000 gld., sed la ceteran financon (la oficejo havas buĝeton de proksimume 38 000 gld.) liveras specialaj aktivecoj kaj kontribuadoj de Societo de Amikoj de la Nov-jorka Oficejo de UEA.

UEA aliĝis al la Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj en Konsulta Stato kun EKOSOK (Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN) kaj partoprenas ĝiajn kunsidojn en Nov-Jorko kaj Ĝenevo (kie s-ro Claude Piron reprezentas UEA). La Sekretario de EKOSOK, s-ro Robert Muller, ankaŭ konata pensulo pri UN-aferoj kaj filozofo, partoprenis la 64an Universalan Kongreson en Lucerno kaj faris la ĉefan paroladon. Li estas la ĉefa funkciulo de tiu centra socia organo de UN.

Nove nomita kiel konstanta reprezentanto de UEA en la UN-Centro en Vieno estas d-ro Hans Michael Maitzen, kiu reprezentis la Asocion en la Konferenco de UN pri Scienco kaj Tekniko en Evoluigo (Vieno, aŭgusto 1979). Antaŭe UEA ne havis reprezentanton ĉe UN en Vieno.

La bulteno *UN kaj ni*, kiu donas regulan superrigardon de la agado de UEA ĉe la diversaj organoj kaj fakaj instancoj de UN, nun atingis sian 17an numeron, ĉiam efike redaktata de s-ino Akiko Woessink-Nagata. La fakto ke la UK okazis en Svislando donis bonan okazon kontakti kun fakaj instancoj de UN kun sidejo en Ĝenevo, inkluzive la Internacian Telekomunikan Union.

Fine de 1979 la porinfana fako de UN, UNICEF, eldonis belajn salutkartojn en Esperanto por la Novjaro kaj por la Semajno de Internacia Amikeco. Ili estas aĉeteblaj ĉe UEA. Antaŭe UNICEF ĉiam rifuzis eldoni siajn salutkartojn en la Internacia Lingvo.

(2) Unesko: Kun subteno de vasta gamo de la neregistaraj organizaĵoj (NROj) en konsultaj kaj kunlaboraj rilatoj kun Unesko, UEA elektiĝis en junio 1979 estrarano de la Konferenco de NROj ĉe Unesko — ofico, kiun ĝi plenumos dum du jaroj. Tio metas nian Asocion inter la plej influajn NROjn ĉe tiu monda organizaĵo. Reprezentis niajn interesojn tie malgranda komisiono sub la gvido de s-ro E. Chicot.

Iom post iom montriĝas, ke UEA ludis decidan rolon en la revizio de la provizora raporto de la Internacia Komisiono pri Problemoj de Komunikado, kiun la Ĝenerala Direktoro de Unesko starigis en 1977. Kvankam la fina raporto ne eksplicite mencias Esperanton,



Mondorganizaĵoj komencas interesiĝi pri nia laboro: Robert Muller (maldekstre) dum la Kongreso en Lucerno

ĝi amplekse traktos la lingvan problemon, laŭ vidpunkto kongrua al tiu de UEA. Tiu temo apenaŭ estis menciita en la provizora versio, kio kaŭzis energian intervenon de UEA.

En decembro aperis baza broŝuro pri Unesko en Esperanto, eldonita de la Oficejo pri Publika Informado de Unesko. Ĝi estis distribuita kun la decembra *Esperanto*.

Eble la ĉefa okazintaĵo de la jaro por UEA estis la organizado, flanke de la Konferenco de NROj, de Simpozio pri la Rajto je Komunikado, kun vasta partopreno de NROj. UEA respondecis pri la preparlaboroj en la sekcio pri lingva komunikado. Unu el la ĉefaj parolantoj en la Simpozio (invitita laŭ instigo de UEA) estis s-ro Claude Piron, iama kunlaboranto de UN kaj konata esperantisto. Sekve de la Simpozio, UEA nun gvidas laborgrupon de NROj pri la temo, sub egido de la Konferenco de NROj. La Simpozio, kiun unue proponis kaj elkovis UEA, rezultigis vastan kaj pozitivan atenton pri lingvaj problemoj kaj Esperanto inter la NROj.

(3) Regionaj Organizaĵoj: La Eŭropa Esperanto-Centro en Bruselo daŭre prizorgas la rilatojn kun Eŭropa Komunumo kaj kun Eŭropa Parlamento. Ĝi nun regule ekspedas informojn pri Esperanto al parlamentanoj kaj intervenas laŭ la eblecoj. Ĝin gvidas s-ro G. Maertens.

La rilatojn kun la Organizo de Amerikaj Ŝtatoj, kun kiu UEA akiris oficialajn kunlaborajn kontaktojn en januaro 1979, prizorgas dekpersona laborgrupo en Vaŝingtono, kiu samtempe okupiĝas pri la eksteraj rilatoj de la usona landa asocio ELNA. La prezidanto de UEA gvidas la grupon; ĝia sekretario estas s-ro John Dale.

Novaj estas la kontaktoj kun la Organizo pri Afrika Unueco, kiu sendis al la UK en Lucerno sian ambasadon en Ĝenevo. Tiuj kontaktoj daŭras, kaj la du organizaĵoj esploras kampojn de praktika kunlaboro.

(4) Neregistaraj Organizaĵoj: Tre signifata atingo estis rezolucio de la Monda Federacio de Asocioj pri UN, kiu ĉe sia konferenco en septembro alvokis siajn landajn asociojn al kunlaboro kun Esperanto-asocioj kaj rekomendis, ke ili subtenu la enkondukon de la Internacia Lingvo en la lernejojn. La ĝenerala sekretario de la Federacio gastis dum unu tago ĉe la UK en Lucerno kaj partoprenis podian diskuton.

ELNA starigis preparkomitaton pri Esperanta agado kunlige kun la Olimpikoj. Kunlabore kun UEA ĝi lanĉos sisteman kampanjon pri utiligo de Esperanto flanke de olimpikaj sportistoj kaj funkciuloj.

Kun pluraj aliaj organizaĵoj UEA kunlaboris dum 1979, ekzemple per interŝanĝo de reprezentantoj en kongresoj kaj konferencoj. Ili inkluzivas Amnestion Internacian, Mondcivitanan Asembleon, Eŭropajn Federalistojn kaj Mondan Konsilion de Eklezioj.

(5) Jaro de la Infano: La jaro 1979 estis deklarita de UN kiel Internacia Jaro de la Infano. Ne estas eble ĉi tie komplete listigi la multegajn kontribuojn al tiu jaro faritajn de UEA aŭ la landaj kaj fakaj asocioj. Je

ĉiu nivelo — de lokaj kluboj ĝis la monda UEA — okazis apartaj aranĝoj pri la Jaro. Fotoekspozicio de Zdravko Nikolov (Bulgario) estis prezentita en Lucerno kaj poste pendis en la nova oficejo de UEA en Nov-Jorko. UEA aperigis glumarkon en Esperanto. TEJO eldonis specialan numeron de *Kontakto*. La instruista faka asocio ILEI organizis grandan ekspozicion de infandesegnaĵoj. Eble la plej bela atingo estis aperigo en Esperanto de bunta libro **pri** la monda infanaro **por** infanoj, kiun eldonis la dana komitato pri UNICEF en traduko de Eliza Kehlet.

(6) Landa ekstera agado: Ankaŭ ĝi estas multe tro vasta por detaligo. Menciinda tamen estas nova impulso en la parlamenta agado en Britio (nun pli ol cent parlamentanoj subtenas Esperanton) kaj en Italio (kie nun funkcias parlamenta grupo laŭ la brita modelo), kunlaboro kun landaj sciencaj institucioj (Rumanio, Soveta Unio, Brazilo) kaj kun UN-asocioj (Hispanio, Svedio, Danlando, Nov-Zelando), kaj intervenoj pri Esperanto ĉe ŝtataj instancoj (Usono, Aŭstralio, Irano). Pluraj landaj asocioj nun havas komisionojn pri eksteraj rilatoj.

10. KULTURO KAJ EDUKADO

(1) Kulturo: Post kelkara paŭzo, en 1979 komenciĝis pli sistema agado de UEA cele al evoluigo kaj kunordigo de la kultura agado. Estis fondita Konsilio pri Kulturo, kiu renkontiĝis unuafoje en Lucerno, kaj kiu konsistas el kvardeko da reprezentaj homoj el ĉiuj kulturaj branĉoj. Ĝin gvidas siavice pli malgranda Komisiono pri Kulturo, kiu en sia laboro aparte atentigas la evoluigon de la popularscienca verkado, kunordigon de la distribuado de libroj kaj evoluigon de la eldonado de diskoj kaj sonbendoj. La Komisiono faras sian eblon instigi Esperantajn trupojn ludi originale verkitajn Esperantajn teatraĵojn.

Laŭ invito de la urbestro de Marília kaj de pluraj aliaj brazilaj instancoj okazis meze de aprilo 1979 en Marília, Brazilo, Internacia Scienca Simpozio kun proksimume 50 partoprenantoj el 13 landoj, kiuj diskutis la utiligon de la rezultatoj de la scienco precipe por evolulandoj.

Post brila eldona jaro en 1978, la jaro 1979 estis iom pli normala laŭ la nombro kaj graveco de aperintaj libroj. Eble la plej elstara eldona okazintaĵo estis ne aperigo de libro sed publikigo de la unua numero (januaro 1980) de la sendependa novaĵmagazino *Monato*, tute nova eksperimento en la Internacia Lingvo, kun ampleksa enhavo, lerte redaktita. Inter la plej gravaj libroj estis du novaj kontribuoj al la Serio Oriento-Okcidento: *Elektitaj fabeloj* de I.A. Krilov kaj la eposo *Aniara* de la sveda Nobel-premiito Harry Martinson. Elstaras ankaŭ la memorlibroj *Ĉiu ĉiun* de Teo Jung kaj *Leo Tolstoj*; *La homo, la verkisto kaj la reformisto* de Victor Lebrun. Eldonaj furoraĵoj fariĝis la grafike kaj enhave novstilaj *Asteriks la gaŭlo* (lerte tradukita bildrakonto) kaj *Praktika bildvortaro de Esperanto*. Aperis signifaj studoj pri la originala



Esperanto-literaturo (de W. Auld) kaj la Esperanta tradukarto (de F. de Diego). La plej aktiva eldonisto estis Hungara Esperanto-Asocio, kiu pliriĝis la libromerkaton per pluraj valoraj volumoj.

Ĉi-jare la Belartaj Konkursoj de UEA havis novan branĉon: la infanliteraturon, honore al la Internacia Jaro de la Infano. La juĝadon denove gvidis Baldur Ragnars-son (Islando) kaj Alec Venture (Britio).

Sur la kampo radio plej grava novaĵo estis ampleksigo de la elsendoj de Radio Pekino, kiu nun, same kiel Pola Radio, elsendas ĉiutage trifoje. Estas notinde, ke tio estas nur unu elemento en la transformiĝo de la eksterlanda Esperanto-informado el Ĉinio: radikale ŝanĝis sian karakteron ankaŭ la monata revuo *El popolo la Ĉinio*, kiu nun enhavas multajn artikolojn de ĝenerala intereso kaj informojn pri la Esperanto-movado.

(2) **Edukado:** La laboro ĉefe koncentriĝis je la definitivigo de la regularo pri internacia mezgrada ekzameno kaj lanĉo de internacia koresponda kurso por progresintoj. Tiu kurso — laŭ aserto de Pola Esperanto-Asocio, kiu prizorgos ĝin — efektiviĝos ankoraŭ en 1980. Tute aparte oni laboris pri la starigo de iuspeca manlibro de kursgvidanto, en kiu oni trovos konsilojn kaj praktikajn ekzemplojn de utiligeblaj ekzercoj, kies celo estas faciligi kaj variigi la instruadon konforme al la modernaj instruprincipoj. Menciindas ankaŭ la el-

laboro de tute nova internacia lernolibro "Esperanto en dialogoj", verkita nur esperantlingve fare de A. Pet-ty'n (konsultinto W. Auld, prezidanto de la Akademio). Ĝi baldaŭ eniros presejon kaj — kun diskoj kaj son-kasetoj — aperos ĉe pola eldonejo. Grandan atenton provokis la instrumaterialo por "ekspresaj" kursoj de Internacia Kultura Servo (Jugoslavio), kiu post tiu-tema artikolo en *Esperanto* (januaro 1980) ricevis pli ol cent mendojn de la eksperimenta materialo.

11. JUNULARA SEKCIO

(Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)

(1) **Enkonduko:** Pluraj novaj iniciatoj karakterizis ĉi tiun laborperiodon de TEJO. Denove, kiel en antaŭ-aj jaroj, pleje elstaris la eksteraj rilatoj, sed aldoniĝis ankaŭ la ĝisdatiĝo de la revuo de TEJO, aliĝo de plia landa sekcio, pligrandiĝo de la Pasporta Servo, sukcesa Internacia Junulara Kongreso, klopodo pligrandigi la individuan membraron ktp.

(2) **Komitato:** Ĝi konsistas el 53 komitatanoj, el kio 36 estas komitatanoj A (elektataj de la landaj sekcioj), 11 komitatanoj B (ilin elektas komitatanoj A) kaj 6 komitatanoj C (estranaroj). La Komitato kunsidis dum la 35a Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO, en Austerlitz (Nederlando), en julio 1979. Ses komitataj komisionoj okupiĝas pri specifaj labor-kampoj kaj aktivas ankaŭ ekster IJK kaj komitat-kunsidoj.

(3) **Estraro:** Post dujara prezidanta funkcio, Savas Tsiturides (Greklando) fariĝis honora prezidanto de TEJO, kaj la antaŭa estrarano Floreal Gabalda (Venezuelo) estis elektita kiel honora membro. En 1979 la Estraron forlasis Gert van Tongerlo (Belgio) kaj Imre Szabó (Hungario). La novan Estraron, kiu laŭ la Statuto de TEJO estas elektita por dujara oficperiodo, unuafoje eniris: Ian Jackson (Britio), Michael Lenn-artz (Germana DR), Zdravka Metz (Jugoslavio) kaj Bob Venhuizen (Nederlando). La prezidanteco transiris al Stefan MacGill (Nederlando). Al la tradicia estrara taskaro aldoniĝis la Pasporta Servo kaj la edukado. Intensiĝis la ritmo de la estraraj kunsidoj, kiuj okazis en aprilo 1979 en Massa (Italio), en julio en Austerlitz (Nederlando), en decembro en Würzburg (FR Germanio). Neoficialaj estrarkunsidoj okazis en Lichtaart (Belgio) kaj en Roterdamo.

(4) **Membraro:** En 1979 TEJO havis 322 individuajn membrojn en 46 landoj (123 MJ-K, 176 MA-K, 23 DM-K). Tiun malkreskon kompare kun 1978 (343 membroj) kaŭzis la koncentriĝo de 26-jaruloj en 1979. Por kontraŭbatali tiun nombrofalon, TEJO/UEA lanĉis fine de 1979 eksperimentan trijaran kampanjon, laŭ kiu la gejunuloj sub la aĝo de 18 jaroj pagas unujaran kotizon por dujara membreco en TEJO/UEA. Al- iĝis landa sekcio en Norvegio, sed malfondiĝis tiu en Danlando. La nombro de la asociaj membroj de TEJO en 1979 estis 6625.

(5) **Servoj:** La nombro de la gastigantoj en la Pas- porta Servo kreskis al pli ol 360 adresoj en 48 landoj.

Institucio Hodler subvenciis nacilingvan varbadon por la Servo. Denove aperis (kunlabore kun Monda Turismo) kalendaro de Esperantaj aranĝoj.

(6) Kongresoj: La 35a Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO okazis en Austerlitz (Nederlando), inter la 20a kaj 27a de julio 1979. Pro la malgrandeco de la ejo, partoprenis nur iom pli ol 320 gejunuloj el 30 landoj, kvankam la intereso estis konsiderinde pli granda. La Kongreso okazis sub la alta protekto de la nederlanda kultur-ministro kaj ĝuis ankaŭ financan subtenon de la nederlanda registaro. Tre vigla LKK de la 35a IJK preparis escepte varian programon. Financa la Kongreso portis al la TEJO-Fondaĵo 4 847,27 guldenojn. Dum la 64a UK en Lucerno okazis la kutimaj junularaj aranĝoj, inkluzive de publika debato. Forte kreskis la nombro kaj kvalito de la aranĝoj de landaj sekcioj. Elstaris la 3a Junulara Esperantista Renkontiĝo de Brazilo (januaro 1980), 23a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo (decembro 1979), ekspozicio de la landa sekcio en Madagaskaro (decembro 1979), Internacia Junulara Festivalo en Italio kaj Junulara Renkontiĝo en Hungario. Laborgrupoj en junularaj renkontiĝoj ludis esencan rolon en la traduklaboro pri unu el la plej vendataj verkoj de 1979 — *Asteriks la gaŭlo*. Tre bone evoluas la preparlaboroj por la 36a Internacia Junulara Kongreso, kiu okazos fine de julio 1980 en Rauma (Finnlando).

(7) Eldonaĵoj: *Kontakto*, revuo de TEJO, aperis 5-foje en 1979 kaj post kvarjara strebo sukcesis reakuratiĝi sian eldonritmon. En la jarkolekto 1979 estis traktitaj i.a. la temoj: interŝtataj unuiĝoj, sekso, Tria Mondo. La revuon redaktis Stefan MacGill kaj Dario Besseghini, kunlaboris trideko da gejunuloj el 15 landoj. Krom al 322 individuaj membroj de TEJO, *Kontakto* distribuiĝis ankaŭ al 226 abonantoj kaj 150 kolektivaj abonantoj (Hungario kaj Jugoslavio). La revuo havas entute ĉ. 800 legantojn en kvindek da landoj. Krome, unuopaj numeroj havis kvantajn mendojn de difinitaj junularaj aranĝoj: IJK (450 ekzemplerojn), Internacia Seminario de GEJ (150 ekz.). La eldonkvanto de *Koncize*, komuna novaĵbulteno de TEJO kaj pluraj landaj sekcioj, kreskis al 2 000 ekzempleroj. Nun ricevas ĝin ankaŭ la individuaj membroj kaj la abonantoj de *Kontakto*. Sekve, *Info* nun celas ĉefe la landajn sekciojn kaj la komitatanojn. "TEJO-paĝo" en la revuo *Esperanto* aperis okfoje en 1979; tie estis publikigitaj ankaŭ raporto pri la 35a IJK kaj artikolo pri la kongreslando de TEJO en 1980. La nacilingva bulteno *NNN* (Novaĵoj, News, Nouvelles), kiun redaktas Christian Darbellay, aperis trifoje en du lingvoj. El ĝi reprenis informojn ankaŭ junulara informilo eldonata de UN en Ĝenevo. La gazeteltondaĵa bulteno pri la lingva diskriminacio, *Sufoko*, ĉesis aperi post la numero 8. Estas interkonsentite kun parto de la sekcio en Jugoslavio, reeldoni la popularan legolibron *Ĉu vi parolas tendare?*, apud kiu viciĝos dua legolibro, kiun TEJO preparas por eldono. La junularo en FR Germanio, Nederlando, Jugoslavio kaj Slovakio eldonis edukan materialon por junuloj.

(8) Eksteraj rilatoj: Sur ĉi tiu laborkampo TEJO dum la pasinta jaro spertis grandan plivigliĝon kaj atingis gravajn sukcesojn. Dum la IJK en Austerlitz okazis seminario pri la temo "Interŝtataj unuiĝoj — kiucele?", kun partopreno de eminentaj ekstermovadaj prelegantoj kaj kun financa subteno de Eŭropa Junulara Fonduso kaj de Unesko. 32-paĝa Esperanta kaj 16-paĝa francalingva raporto pri la seminario jam aperis; anglalingva raporto estas preparata. Ekde majo 1979 TEJO membriĝas en la t.n. Ĝeneva Neformala Kunveno, kiu post 1968 arigas internaciajn junularajn organizaĵojn ĉirkaŭ la junulara fako de Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo. TEJO reprezentigis en ĝiaj du kunvenoj: en majo 1979, Ian Tarrant partoprenis la kunsidon en Ĝenevo, dum en oktobro 1979 la parizan kunvenon partoprenis Barbara Despiney, kiu prizorgas por TEJO ankaŭ la rilatojn kun Unesko. Krome, TEJO estis reprezentita en grava regiona konferenco de UN pri problemoj de la afrika junularo, okazinta en Nairobi (Kenjo) en decembro 1979. Ĉio ĉi eblis dank' al la kontinueco, kiun al la laboro de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO portis la pasintjara volontulo Ian Tarrant (Britio, nun Kenjo), al kiu en aŭgusto helpis Neven Kovačić (Jugoslavio) kaj poste Sylvaine Bourrelly (Francio). Jam en septembro 1979 ekis preparlaboroj por nova seminario, kiu okazos de la 15a ĝis la 22a de junio en Strasburgo (Francio). La temo de la seminario estas "Internacia komunikado — aplikado de Esperanto" kaj ĝin komplete financos Eŭropa Junulara Centro de Eŭropa Konsilio.

(9) Varbado: La Komisiono pri Varbado, elektita dum la 35a IJK, prilaboras plurajn projektojn, kiuj inkluzivas manlibron pri varbado, instigadon verki kaj produkti trafajn varbilojn, kiuj konkursu por aparta premio de TEJO, faldfoliojn kaj afiŝojn (ankaŭ nacilingvaj). Por aparte atenti la komencantojn, la bulteno *Koncize* estonte havos apartan paĝon por la novuloj, pri kiuj ankaŭ *Kontakto* havas planojn.

(10) Regiona agado: Elstaras laboro en pluraj latinamerikaj landoj: Brazilo, Kolombio (grupo en Medellín) kaj Peruo. Esperantista Meksikia Junularo viglas kaj kandidatas por organizi IJK en 1981. En la venezuela ĉefurbo funkcias universitata Esperanto-klubo. Okazis kontaktoj ankaŭ kun junulo el Maroko kaj kun grupo en Hinda Unio. Dum trimonata vizito de Zdravka Metz al Japanio eblis konstati, ke en tiu lando troviĝas la plej amasa ekstereŭropa junulara Esperanto-movado, kiu estas bone organizita loke kaj regione, sed ne je la landa nivelo, pri kio necesas fari pliajn klopodojn.

(11) Konkludo: La ĉefa trajto de la pasinta laborperiodo atentigas pri la graveco de la kontinua laboro, precipe sur la kampo de la eksteraj rilatoj. Estas iom strange, ke nun, kiam la financaj rimedoj de TEJO tion permesas, montriĝas sufiĉe malfacile trovi taŭgajn volontul(in)ojn por plenumi la bazan parton de la laboro. Necesas fari pliajn klopodojn aktivigi la Komitaton ankaŭ inter ĝiaj kongresaj kunsidoj, kio eblas tra la ekzistantaj komisionoj pri unuopaj laborkampoj.

12. LANDA KAJ FAKA AGADO

A. Landa kaj regiona laboro

Same kiel oni asertas, ke landaj asocioj estas tiel fortaj kiel fortas la lokaj kluboj, ni devas konstati, ke UEA mem estas tiel signifa kiel la kvanto kaj kvalito de ĝiaj landaj asocioj. Do, estas precipa celo de la estrarano kaj de la Komisiono por Landa Agado atingi per celtrafa laboro tiun kvanton, tiun kvaliton. La Estraro daŭre klopodis pri aktiva kaj intima kunlaboro kun laŭeble ĉiuj naciaj movadoj. En tiu kunteksto estas sukceso, ke la Komitato povis akcepti en Lucerno la aliĝon de du pliaj landaj asocioj (Portugalia kaj Ĉilio). Se ni konsideras, ke ĝis antaŭ du jaroj kunlaboris kun UEA nur 35 aliĝintaj landaj asocioj, kaj nun estas jam 42, ni povas konstati, ke laŭeblaj vizitoj de estraranoj al foraj landoj kiel Ĉilio, Peruo, Venezuelo kaj Portugalio estas necesaj kaj utilaj. Personaj kontaktoj

dum la Universalaj Kongresoj, ĉiun duan jaron, al landa asocio, kiu atingis grandan plialtiĝon de la individua membraro de UEA. Post Japanio kaj Svedio en antaŭaj jaroj, Belgio ricevis tiun distingon en 1979. Tie oni atingis 27%an plialtiĝon de la individua membraro, kunfondis la Grafikan Centron Antverpeno, Eŭropan Esperanto-Centron en Bruselo ktp. En la venontaj monatoj la trofeon ricevos la plej aktiva loka klubo en Belgio.

Kun bedaŭro la Estraro devas konstati, ke kelkaj landaj asocioj ne donas adekvatan gravecon al la rolo de la A-komitatano. Venas homoj al la komitatkunsidoj sen la necesa preparo, sen koni la laborproceduron, sen scioj pri la propra landa movado, sen trastudo de la tagordaj dokumentoj, sen informiteco pri la internacia movado. Estas dezirinde kaj necese, ke ĉiuj utiligu sian demokratian rajton influi la planojn kaj agadon de UEA. Okazis, ke kelkaj landaj asocioj ne nur ne sendis la komitatanojn al la gravaj debatoj pri la nova Statuto, sed eĉ ne voĉdonis en la tiurilata fina decido.

UEA celas apliki en la diversaj regionoj diversajn agadteknikojn pro konsidero de la malsamaj sociaj kondiĉoj. Tial en Eŭropa Komunumo la laboro por Esperanto estas tute malsama al, ekzemple, tiu en Afriko aŭ en Latinameriko. En la kunveno pri la landa kaj regiona agado, en Lucerno, oni povis nur denove konstati, ke influi tutan regionon eblas nur per daŭra ĉeesto de spertuloj kun movadaj kvalifikoj. Certe ne sufiĉas sendi lernolibrojn, revuojn kaj bonajn konsilojn. Facilanime eŭropanoj diskutas kaj debatas pri la t.n. Tria Mondo, sed veran konon de la problemoj kaj eventualajn solvojn povas atingi nur homoj loĝantaj en la koncerna socio.

Inter la atingoj en la regiona agado necesas menci la preparon de la Dua Pacifika Kongreso, en Kanado, kaj la Tutamerika Kongreso, en Argentino. — Ankaŭ en la okcidenta Eŭropo okazis pluraj renkontiĝoj diversnaciaj. Ĉiuj tiuj regionaj kunvenoj, kiel ankaŭ la kunvenoj de la orienteŭropanoj, estas ege utilaj kaj subtenindaj, ĉar ili donas la eblecon debati komunajn problemojn, eduki aktivulojn, instrui pri varbado ktp. Ĉar la Estraro havas intereson pri la regionaj kunvenoj, la estrarano pri la landa agado, Ursula Grattapaglia, vizitis en septembro plurajn urbojn en Argentino, pro la Tutamerika Kongreso, kiu havos specialan signifon post la starigo de kunlaboraj rilatoj inter UEA kaj Organizo de Amerikaj Ŝtatoj. Ankaŭ la vizito al Portugalio en aprilo 1979 kaj la partopreno en la Scienca Simpozio en Brazilo devas esti konsiderataj en tiu kunteksto. La Estraro strebas al plifortigo de la regionaj konsultiĝoj, ĉar por atingi sukceson en nia laboro, la taktiko de nia agado devas varii de regiono al regiono.

Dum la Kongreso en Lucerno okazis kunveno de la ĉefdelegitoj kaj delegitoj. La kunveno, kiu altiris amason da ĉeestantoj, estis tre vigla, kaj la respondeca estrarano notis multajn interesajn ideojn kaj opiniojn. El la 40 ĉefdelegitoj kaj perantoj, 20 raportis pri la



Kio okazas en Ĉeĥoslovakio? D-rino Flora Szabó-Felső, estrarano de UEA, iris tien por surloke konatiĝi kun problemoj de la landa Movado. Maldekstre: d-ro J. Jermář.

pli bone povas krei tiun pozitivan senton de kunlaboro ol nura korespondado. Cetere, tiel oni iras ankaŭ renkonte al la deziroj de la Komitato, ekster la statutaj pretendoj, al pli fundaj analizoj de la situacio en unuopaj landoj. Krome, ni ne preterlasu, ke organiziĝis en pluraj landoj novaj landaj asocioj, kiel en Kubo kaj Turkio.

Por honori la plej aktivan landan asocion, el Kanado venis al UEA la Trofeo Fyne, kiu estas transdonata

situacio kaj laboro farita. La raportoj montras, ke en pluraj landoj okazas energia laboro por plivastigi kaj pliefikigi la delegitan reton, dum en aliaj landoj pli energiaj klopodoj povus esti dezirindaj.

B. Faka agado

Aldoniĝis 2 pliaj kunlaborantaj fakaj asocioj, vd. ĉap. 2(7). Intertraktoj pri kunlaboro okazas kun kelkaj aliaj. Progresas ankaŭ preparoj por fondo de pliaj fakaj asocioj. Raporton pri sia agado sendis 18 el la 28 aliĝintaj kaj kunlaborantaj fakaj kaj neneŭtralaj asocioj (64%). Denove 4 asocioj aranĝis propran kongreson, vd. ĉap. 7. Ĉiuj aliĝintaj kaj 19 el la (tiam) 23 kunlaborantaj organizaĵoj kunvenis dum la UK. Ankaŭ en Lucerno okazis asembleo de la fakaj asocioj, kiu decidis daŭrigi la eldonadon de la bulteno *Interfake*, kaj prezentis kelkajn ideojn al la Estraro de UEA por konsidero.

Daŭre tre aktivas la fervojistoj, per ekspozicioj en diversaj landoj, kursoj en fakaj lernejoj, fakprelegoj liveritaj al fervojistaj kaj sindikataj instancoj, intervjuoj en gazetoj, radio, televido. La medicinistoj aranĝis la 2an Internacian Medicinan Esperanto-Konferencon en Hungario. La filatelistoj preparas katalogon pri Esperantaj poŝtmarkoj kaj poŝtstampoj. La poŝtistoj aranĝis simpozion "Poŝto kaj Esperanto", en Sofio; la radio-amatoroj organizis la 3an Esperantan radio-konkurson, kaj Monda Turismo denove aranĝis Internacian Foiron de Esperanto-Turismo, en Pollando. La sekretario de la vegetarana asocio estas samtempe sekretario de Internacia Vegetarana Unio kaj utiligas tiun pozicion maksimume por enkonduki la uzadon de Esperanto. Pri aktivado en fakaj kongresoj, ĵurnaloj kaj aliaj instancoj raportas la naturistoj, poŝtistoj, radio-amatoroj, Monda Turismo, vegetaranoj, bahaanoj kaj kvakeroj. Pri terminara laboro informas la fervojistoj, medicinistoj, aŭtomobilistoj kaj matematikistoj.

13. ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Post kelkjara baraktado kun administraj kaj teknikaj mankoj ĉe la eldonejo Mouton, ekde 1980 la scienca revuo *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado (LPLP)* transiris al la eldonejo de la Universitato de Teksaso, en Usono. Laŭ nova, tre esperiga interkonsento, pene ellaborita dum la daŭro de 1979 precipe fare de la estrarano de CED d-ro Jonathan Pool, *LPLP* aperados en iom pli ampleksa formo, kun iom malpli alta abonkoto, kaj kun bona perspektivo atingi ekvilibron de spezoj post du-tri jaroj (de la komenco *LPLP* ĉiam bezonis subvencion de UEA). La revuo daŭre aperas sub redakto de d-ro Richard E. Wood.

Dum la UK en Lucerno okazis la dua Esperantologia Konferenco organizita de CED, ĉefe sub gvido de ties estrarano d-ro Detlev Blanke, kun multnombra ĉeesto de la publiko. D-ro Blanke daŭrigas ankaŭ la kontaktojn kun prof. Neergaard koncerne eventualan revivigon de la revuo *Esperantologio*.

Esperanto-dokumentoj, serio eldonata de UEA, aperadas en tri lingvoj (angla, franca, Esperanto), sub redakto de d-ro H. Tonkin. Plej laste aperis en la serio ampleksa referaĵo de Ralph Harry kaj Mark Mandel pri la lingva situacio en UN, kaj studo de Claude Piron kaj Humphrey Tonkin pri tradukado en internaciaj organizaĵoj. La serio estas abonebla ĉe UEA. La jam en Esperanto aperinta dokumento de C. Piron, *Esperanto – ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?*, estis eldonita en Belgio en nederlandlingva traduko. Aperis ankaŭ germana traduko de tiu studo. Anglalingva versio aperos en la serio baldaŭ. La raporto de la UK en Rejkjaviko (1977) estis distribuita al ĉiuj ambasadoroj ĉe UN laŭ iniciato de R. Harry.

Seminarioj kaj konferencoj pri esperantologiaj temoj okazadis tra la jaro diversloke, daŭrigante emon jam konstatitan dum la pasinta jaro. Aperis jen kaj jen ankaŭ nacilingvaj sciencaj studoj pri Esperanto, foje en prestiĝaj sciencaj periodaĵoj – kio estas fenomeno nur de la lastaj jaroj.

14. FINAJ VORTOJ

La traktita raportoperiodo estas la lasta, kiu plene kuŝas interne de la mandato de la Estraro elektita en 1977. Tiu Estraro nun raportas por la tria fojo. Se ni volus iom konklude paroli ne nur pri la ĵus pasinta laborjaro, sed ankaŭ pri la tuta mandato, helpus reiri al la "Taskaro prioritata" (*Esperanto*, majo 1978, p. 91), kiu listigis kaj priskribis la ĉefajn taskojn kaj celojn de la centra plenumorgano de UEA. Ni provu kelkvorte resumi la staton sur la ĉefaj laborkampoj. Ŝajnas, ke UEA komencas trarompi iun multjaran "magian" cirkon en la kampo de la financo kaj administrado. La financo de la Asocio dum pluraj sinsekvaj jaroj montras sanan bildon. Tio ne okazas pro la dezirinda ŝanĝo de la enspezofontoj, kion volis – kaj ankoraŭ volas – sproni la Financa Programo. La financa stabileco de la Asocio ŝuldiĝas ĉefe al la pli zorga mastrumado kaj senĉesa sekvado de la financa evoluo. Estas ĉi tie akcentinda ankaŭ la kuraĝo de la Estraro, kiu trovis rimedojn kaj manierojn por subteni la iniciatojn, kiuj kondukis al la funkciigo de la Grafika Centro en Antverpeno kaj la Oficejo de UEA en Nov-Jorko. Supozeble, la Estraro elektota en Stokholmo havas la saman kuraĝon por konduki kelkajn aliajn ambiciajn planojn al la realiĝo. Tio unuavice koncernas la aŭtomatigon de la Centra Oficejo en Roterdamo kaj la starigon de la planata oficejo en Budapeŝto. Se UEA sukcesos realigi parton de la planoj pri la ŝanĝo de la financaj fontoj (ekstermovadaj subvencioj, profitdonaj turismaj aranĝoj ktp), ni efektive baldaŭ povos paroli pri la pligrandigo de la agadskalo sur la kampo de la financo kaj administrado.

Tiu pligrandigo de la skalo jam okazis sur unu el la laborterenoj – la eksteraj rilatoj. Tie dum la lastaj jaroj la Asocio spertas grandan pozitivan ŝanĝon, unuavice pro sia propra aktiviĝo rilate la internaciajn organizaĵojn kaj agadojn al kiuj ĝi ligiĝas. Tiu aktiviĝo

eblis kaj restas ebla pro la fakto, ke pluraj labor-grupoj sisteme flegas kaj prizorgas la eksterajn rilatojn. Sur la kampoj kulturo kaj edukado okazis ĝis nun nur iom da gravaj iniciatoj, sed estas tro frue paroli pri atentindaj rezultoj. UEA sola ne povas tie multon fari sen proksima kunlaboro kun pluraj aliaj movadaj instancoj, ĉu internaciaj, ĉu naciaj. Simile estas pri la informado, kie la kunordiga rolo de UEA plene dependas de la kunlaboremo de la landaj informaj fakoj. La alia aspekto de la informado, tiu direktita al la internaciaj organizaĵoj kaj instancoj, funkcias nun multe pli bone ol iam ajn antaŭe en la pli nova historio de UEA. Rilate la Universalajn Kongresojn aperis dum la lastaj jaroj pluraj marginaj ideoj pri la refreŝigo de la 75-jaraj rutino kaj tradicio. La ŝanĝoj okazas malrapide kaj atente, ĉar oni eĉ ne rajtas abrupte ŝanĝi ion, kio tiel longe vivas kaj ĉiujare altiras grandajn movadajn homamasojn.

En UEA oni ĉiam multe parolis pri la membrovarbado kaj membronombro. Same faris la nuna Estraro, kiu unuflanke sukcesis grave pligrandigi la nombron de la aliĝintaj landaj asocioj, sed aliflanke la gajnojn aŭ perdojn ĉe la individua membraro plej ofte esprimadis per dekoj aŭ maksimume centoj. Estas tempo konstati, ke en mondo kun tiom da transpagaj problemoj kaj tiaj vivnivelaĵoj diferencoj, ne eblas atingi miraklajn ciferojn pri la individua membraro. Kiam eblos pagi la kotizon per rubloj aŭ zlotoj aŭ levoj, tiam UEA facile duobligos sian individuan membraron.

Estas malbone kontenti en movado, kiu portas revolucion ideon kaj ankoraŭ batalas por sia loko en la nuna mondo. Ĝenerale, tamen, ni ja kontentu pri la rezultoj. Ili ne estas maksimumo atingebla, sed oni ankaŭ al la Estraro elektota en Stokholmo devas lasi iom da movada laborpotencialo, por ebligi pluan progresigon de UEA kaj de la Internacia Lingvo.

Financaj aldonaĵoj al la Raporto

(Ĉiuj sumoj estas en nederlandaj guldenoj)

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO SPEZOJ POR LA JARO 1979

KOSTOJ	Buĝeto	Rezultoj
Salajroj malnete	238 200	240 835,87
Sociaj asekuroj pagataj de UEA	51 600	46 470,78
Minus kompensoj pro malsano	- 2 400	- 4 132,77
Salajroj, nete	287 400	283 173,88
Afranko kaj telefono	23 400	22 321,02
Presaĵoj	5 100	9 340,70
Materialoj	7 800	9 414,94
Riparo de maŝinoj	2 800	2 438,38
Revizoroj, trinkaĵoj k.a.	3 100	2 157,07
Oficejo, nete	42 200	45 672,11
Fotokopiado	6 000	6 059,17
Minus vendoj kaj kompensoj	- 2 500	- 3 480,19
Fotokopiado, nete	3 500	2 578,98
Gaso, elektro, akvo	5 400	5 695,04
Riparo de la domo, purigiloj	3 900	4 758,16
Asekuro kaj impostoj	2 000	3 154,67
Minus lupagoj pro ĉambroj	- 1 700	- 929,61
Oficeja domo, nete	9 600	12 678,26
Preskostoj "Esperanto"	33 200	34 950,00
Sendokostoj	50 300	41 180,92
Kovertoj	3 200	3 548,82
Grafikaj k.a. kostoj	---	31 554,89
Minus anoncoj	- 10 700	- 19 206,24
"Esperanto", nete	76 000	92 028,39

Preskostoj de la Jarlibro	15 400	15 300,00
Sendokostoj, kovertoj	6 100	9 525,06
Grafikaj k.a. kostoj	---	11 000,00
Minus anoncoj	- 7 200	- 10 076,80
Jarlibro, nete	14 300	25 748,26
Preskostoj "Kontakto"	5 200	6 233,80
Sendokostoj, kovertoj	3 300	3 003,54
Grafiko k.a. minus anoncoj	- 100	7 140,87
"Kontakto", nete	8 400	16 378,21
Unesko-broŝuro	---	5 053,00
Veturstoj oficejaj	6 400	4 903,53
Vojaĝkostoj kongresaj	12 700	6 327,45
Vojaĝkostoj Estraro UEA	18 500	20 117,43
Vojaĝkostoj Estraro TEJO	1 700	1 700,03
Reprezentaj kostoj	2 600	2 197,05
Komisionoj kaj komisiitoj	2 100	1 756,21
Vojaĝ- kaj restad-kostoj	44 000	37 001,70
Volontula Servo	9 100	9 262,49
Korespondo estrara k.a.	8 600	5 928,49
Bankkostoj	500	1 650,21
Kurzperdoj	4 700	4 831,90
Premioj kaj donacoj	3 500	5 710,12
Postpagitaj kaj diversaj kostoj	1 100	1 963,83
Ĝeneralaj kostoj, entute	9 800	14 156,06
Deprezo de la domo, ĉ. 1%	1 300	1 300,00
Deprezo de maŝinoj, mebloj	8 000	9 929,63
Deprezoj, entute	9 300	11 229,63
Pozitiva saldo	---	1 959,62
Sumo de la kostoj	522 200	562 849,08

RIMEDOJ	Buĝeto	Rezultoj
Kotizoj MJ	20 900	19 509,39
Kotizoj MA	178 600	182 205,84
Kotizoj MJ-K	1 900	2 416,18
Kotizoj MA-K	8 200	8 304,50
Individuaj membroj sume	209 600	212 435,91

Asociaj membroj UEA . . . }	26 000	17 544,63
Asociaj membroj TEJO . . . }		6 237,33
Simplaj abonoj "Esperanto" . . .	5 600	5 762,73
Kolektivaj abonoj "Esperanto".	28 200	25 285,34
Kongresaj abonoj "Esperanto".	10 900	13 310,66
Abonoj "Kontakto"	2 300	4 833,60
Societo Zamenhof	23 200	22 422,50
Kotizoj de fakaj organizaĵoj. . .	900	1 252,38
Kotizoj entute	306 700	309 085,08
Donacoj al la Ĝenerala Kaso . . .	6 000	10 196,11
Vendoj de la libroservo	175 000	183 629,53
Minus kostoj de la varoj	- 110 000	- 130 336,56
Minus aliaj kostoj	- 15 000	- 3 692,01
Kongresa libroservo	---	4 869,82
Triono de sendokostoj	4 800	4 727,83
Libroservo, nete	54 800	59 198,61
Abonoj je nepropriaj gazetoj . . .	8 200	6 975,22
Minus kostoj de la gazetoj	- 6 500	- 4 645,04
Abonservo, nete	1 700	2 330,18
Grafikaj laboroj Rotterdam	123 900	120 003,73
Minus kostoj eksteraj	- 46 400	- 45 829,14
Grafikaj laboroj Rotterdam . . .	77 500	74 174,59

Grafikaj laboroj Antverpeno . . . }	15 000	101 285,05
Subvencioj k.a. rimedoj . . . }		5 193,09
Minus salajroj, kompensoj . . . }		-71 520,81
Minus materialoj }		-18 294,18
Minus kostoj de ejo }		- 4 940,69
Minus deprezoj, vojaĝkostoj k.a. }		-10 538,26
Grafika Centro Antverpena . . .	0	1 184,20
20 % de UK-kotizoj	24 700	34 288,66
50 % de licencpago de IJK	3 700	4 375,00
Kongresoj, entute	28 400	38 663,66
Turismaj aranĝoj	6 000	0
Rento, nete	16 800	34 979,31
Kurzgajnoj	---	2 448,47
Vendo de uzitaj poŝtmarkoj. . . .	3 000	4 701,51
Poŝtricevitaj k.a. rimedoj	1 000	4 206,23
Ĝeneralaj rimedoj, entute . . .	4 000	11 356,21
Kompensoj DM, KER, GCA k.a. . . .	5 300	19 697,13
Subvencio de Unesko	---	1 984,00
Kompensoj kaj subvencioj . . .	5 300	21 681,13
Negativa saldo	15 000	---
Sumo de la rimedoj	522 200	562 849,08

BILANCO DE UEA JE LA 31a DE DECEMBRO

AKTIVOJ	1978	1979
Kurantaj bankkontoj	19 499,71	11 321,64
Bankaj ŝparkontoj	205 073,32	130 523,84
Poŝtaj kontoj	26 241,88	25 229,79
Sumoj transpagataj	69 855,81	4 321,25
Kasoj, respondkuponoj	1 309,32	3 924,30
Monrimedoj entute	321 980,04	175 320,82
Valorpaperoj	202 740,00	278 945,00
Ricevotaj rimedoj	61 601,08	104 175,53
Antaŭpagitaj kostoj	20 241,19	22 735,78
Debitoroj	122 052,26	176 009,17
Provizoj libroservaj	151 516,97	156 128,69
Presaĵoj, materialoj k.s.	30 612,06	47 843,26
Provizoj entute	182 129,03	203 971,95
Maŝinoj kaj mebloj	32 266,77	41 416,52
Garantiaj sumoj	4 130,00	15 950,78
Domo en Rotterdam	127 700,00	126 400,00
Tereno Aspremont	1,00	1,00
Sumo de la aktivoj	1 074 841,37	1 144 926,55

PASIVOJ	1978	1979
Rezervo libroserva	15 000,00	15 000,00
Rezervo (domriparoj)	35 000,00	8 878,43
Rezervo por riskoj	10 000,00	---
Rezervoj entute	60 000,00	23 878,43
Antaŭricevitaj rimedoj	102 071,88	84 607,51

Pagotaj kostoj	35 209,96	87 414,14
Kreditoroj	266 878,15	296 627,66
Ŝparkontoj de membroj	978,68	978,68
Fondaĵo Azio-Afriko	275,28	1 000,00
Fondaĵo Evolulandoj	6 603,20	5 603,20
Fondaĵo Canuto	3 058,22	1 338,32
Fondaĵo EKI	5 000,00	13 505,65
Fondaĵo Enciklopedio	603,67	955,67
Eldona Fondaĵo	2 831,79	2 841,79
Financa Programo	47 099,97	39 469,88
Kongresa Rezerva Fond.	26 922,39	34 442,78
Fondaĵo Oficeja Ilaro	1 066,30	0
Premio Jozefo Petrin	515,00	466,57
Premio R. Schwartz	4 304,82	4 304,82
Propaganda Konto	76 139,81	47 082,22
Fondaĵo TEJO	18 380,23	19 568,28
Fondaĵo UN/Unesko	2 488,45	0
Fondaĵoj entute	195 289,13	170 579,18
Kapitalo Dumv. Memb.	291 306,59	297 700,60
Cetera kapitalo	123 106,98	183 140,35
Asocia kapitalo entute	414 413,57	480 840,95
Sumo de la pasivoj	1 074 841,37	1 144 926,55

BUĜETO 1981 KAJ LA REVIZORAJ RAPORTOJ
ne aperas en ĉi tiu revunumero. Pro la frua aperigo de la Estrara Raporto ĉi-foje, ne eblis pretigi tiujn financajn dokumentojn ĝustatempe antaŭ la finredakto de la revuo. Tamen, tiuj mankantaj dokumentoj pretos baldaŭ (la Estraro fakte jam skribis voĉdonas pri la Buĝeto 1981) kaj vi trovos ilin en unu el la sekvantaj numeroj de la revuo.

SPEZOJ de la 63a Universala Kongreso de Esperanto, VARNA, 1978

KOSTOJ	Buĝeto	Rezultoj
Pago al UEA (30% de kotizoj)	76 100	94 239,18
Repago al helpantoj . . .	4 200	6 196,87
Makleraĵo de perantoj . .	8 700	9 674,49
Infana kongreseto . . .	18 300	16 299,92
Inaŭguro	1 000	970,22
Teatra vespero	31 300	30 606,53
Nacia vespero	15 700	19 418,40
Internacia vespero . . .	10 400	6 582,79
Balo, Interkona kaj Junulara vesperoj . . .	3 000	1 746,09
Laborkunsidoj	500	189,00
Ekspozicioj, filmprezentoj .	---	6 266,92
ISU	2 900	3 250,12
Instruaj programeroj . . .	700	1 305,00
Kongresejo	20 900	36 259,16
Aliĝilo	300	1 764,55
Dua Bulteno	5 500	6 655,00
Kongresa libro kaj suplemento	16 900	30 248,50
Glumarko	1 300	1 305,00
Insigno	10 400	8 505,44
Presaj, fotokopioj . . .	2 750	1 177,79
Materialoj	2 500	18 005,23
Reklamado	1 000	1 849,05
Gazetara Servo	2 600	13 152,01
Eksteraj rilatoj	1 300	1 139,00
Afranko	29 500	8 552,13
Telefono, telegrafo . . .	2 500	7 809,66
Kostoj de funkciuloj . . .	---	17 178,84
Vojaĝbiletoj	40 000	52 541,39
Transporto	3 800	11 261,07
Veturadoj enlandaj . . .	5 200	7 851,73
Oficejo	1 000	3 236,40
Bankkostoj, kurzdiferencoj	---	2 573,11
Diversaĵoj	---	2 288,13
Pozitiva saldo	11 350	---
Sumo de la kostoj . . .	331 600	430 098,72

RIMEDOJ	Buĝeto	Rezultoj
Kotizoj	253 600	314 130,60
Infana kongreseto . . .	8 200	6 120,45
Ekskursoj nete	7 200	11 416,73
Bankedo nete	1 650	6 398,65
Gramofondisko	1 750	2 632,49
Libroservo	1 500	0
Glumarkoj	2 400	865,52
Anoncoj, reklamiloj . . .	6 300	7 900,61
Subvencioj, donacoj . . .	---	61 290,22
Loĝmakleraĵo	30 800	2 263,67
Postkongresaj aranĝoj, nete	13 600	8 995,99
Rento	4 200	5 200,31
Diversaĵoj	400	990,15
Negativa saldo	---	1 893,33
Sumo de la rimedoj . . .	331 600	430 098,72

Noto pri la spezokonto de Varna

Kiel aludite jam en la pasintjara Estrara Raporto, la definitiva spezokonto de Varna malfruiĝis pro trans-

pagaj malfacilaĵoj, nun tamen solvitaj. Kvankam la spezokonto finiĝas per negativa saldo, la Kongreso tamen tre pozitive efikis al la financo de UEA, kiu ricevis pli ol 90 000 gld. el la kotizoj de la UK kaj pli ol 70 000 gld. el krompagoj de kongresanoj-nemembroj.

SPEZOJ de la 64a Universala Kongreso de Esperanto, LUCERNO, 1979

KOSTOJ	Buĝeto	Rezultoj
Pago al UEA (30% de kotizoj)	37 200	51 197,06
Repago al helpantoj . . .	3 000	2 961,00
Makleraĵo de perantoj . .	4 000	4 444,56
Infana kongreseto	6 300	7 420,00
Inaŭguro	1 900	276,94
Teatra vespero	9 300	8 130,08
Nacia vespero	5 700	4 880,00
Internacia vespero . . .	6 500	8 833,90
Festaj aranĝoj	9 000	3 494,81
Laborkunsidoj	1 900	1 593,44
Filmoj, ekspozicioj ktp. .	1 000	1 726,82
ISU, instruaj programeroj .	3 900	3 747,63
Kongresejo	20 200	21 186,76
Aliĝilo	1 400	1 750,00
Unua Bulteno	10 200	9 900,30
Dua Bulteno	7 300	8 651,66
Kongresa libro kaj suplemento	11 800	13 610,50
Glumarko, poŝtkartoj . . .	1 100	5 623,91
Insigno	2 000	1 036,00
Presaj, fotokopioj . . .	2 500	4 979,12
Materialoj	6 500	3 875,04
Reklamado	9 200	8 494,10
Gazetara Servo	6 300	4 194,36
Eksteraj rilatoj	1 300	1 530,77
Afranko	9 000	12 051,83
Telefono, telegrafo . . .	1 000	1 851,41
Transporto	1 400	1 023,59
Veturadoj enlandaj . . .	5 700	4 808,75
Sonregistrado, diversaĵoj .	4 700	1 415,05
Bankkostoj, kurzdiferencoj	---	1 437,28
Pozitiva saldo	---	79 937,22
Sumo de la kostoj . . .	191 300	286 063,89

RIMEDOJ	Buĝeto	Rezultoj
Kotizoj	124 000	170 656,86
Infana kongreseto . . .	3 800	5 416,80
Ekskursoj nete	9 300	16 396,19
Bankedo nete	1 000	3 348,05
Libroservo	1 000	4 869,82
Glumarkoj	1 000	1 583,56
Poŝtkartoj k.s.	---	5 038,97
Filatelaĵoj	---	4 279,15
Anoncoj, reklamiloj . . .	12 300	11 900,74
Subvencioj, donacoj . . .	24 400	29 895,22
Loĝmakleraĵo	6 300	12 660,79
Postkongreso nete	5 000	13 787,28
Rento	1 900	2 667,49
Fakaj kunsidoj, diversaĵoj .	1 300	3 562,97
Sumo de la rimedoj . . .	191 300	286 063,89

FINO DE LA ESTRARA RAPORTO

Brazilo

- En Juiz de Fora, inter la 3a kaj 6a de aprilo 1980, okazis la Unua Kongreso de Brazila Konsilantaro de Esperanto. Partoprenis cent da personoj, inter kiuj triono estis gejunuloj. La honora prezidanto de la Kongreso estis la urbestro, d-ro F.A. de Mello Reis. Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de aliaj movadaj organizaĵoj en Brazilo.

Nepalo

- Antaŭ dudeko da jaroj, centoj da gejunuloj en tiu himalaja regno lernis Esperanton. Poste, dum jaroj nenio aŭdiĝis pri la Movado en Nepalo. Lastatempe ges-roj Morita (Japanio) turismis tie kaj renkontis plurajn esperantistojn. Intertempe venis ankaŭ aliaj signoj pri ebla revigliĝo de la Movado en tiu azia lando. Atingis nin informo, ke nepalaj esperantistoj fine de la pasinta jaro organizis prifeston de la Zamenhof-Tago. Vizitontoj petu kontaktadreson de la CO de UEA.

Britio

- Senpaga enkonduka korespondakurso*, verkita de Les Hartridge, tiom sukcesis en 1979, ke nun Brita Esperanto-Asocio presigas kaj distribuas ĝin, kaj starigis tutlandan instruistan reton. Eĉ izolitaj membroj kunlaboras, metante la unuajn lecionojn en publikajn bibliotekojn kune kun okulfrapa afiŝo. La unuaj 22 000 lecionoj estas jam distribuitaj.

- Intensaj Esperanto-kursoj, jam tradicia kaj renoma aranĝo en Barlaston (Anglio), okazos ĉi-jare de la 9a ĝis la 15a de aŭgusto. Instruos i.a. Marjorie Boulton, Kathleen Hall, Paul Neergaard kaj Peter Weatherby. Aligdetaloj estas haveblaj ĉe: Warden, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Britio ST12 9DG.

Portugalio

- La 8a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj okazos de la 13a ĝis la 15a de junio en la urbodomo de Setúbal. La Renkontiĝon organizas Portugala Esperanto-Asocio, kiu pasintjare fariĝis aliĝinta landa asocio de UEA.

Japanio

- La 67a Kongreso de Japanaj Esperantistoj okazos en la Memordomo de la haveno Jokohama, la 23an kaj 24an de aŭgusto (kaj ne julio, kiel erare diris nia "Kalendario" en la marta numero). Ĉi-jare organizas la kongreson Jokohama Esperanto-Rondo. La kongresa programo havos i.a. prelegon pri la televida filmo *Hejmsopira stelo*, kiun kune produktis ĉinoj kaj japanoj pri la vivo de Teru Hasegaŭa (pseŭdonimo Verda Majo). Tiu fa-

ma esperantistino edziniĝis al ĉino kaj loĝis en Ĉinio dum la Dua Mondmilito. Ŝia Esperanta aŭtobiografio *En Ĉinio batalanta* estas vaste konata.

Germana DR

- En Magdeburg, Germana DR, d-ro Till Dahlenburg prelegis en februaro pri "Situacio kaj apliko de planlingvoj por la internacia komunikado, kun aparta konsidero al Esperanto". Pli ol 60 profesiaj lingvistoj aŭskultis. La diskuto post la prelego temis i.a. pri la literaturaj valoroj de Esperanto kaj pri ĝia evoluo.

Fake

Periodaĵoj

- Oni multe jubileas en la Movado. Sufiĉas jam kvin jaroj da ekzisto de io, kvin aŭ dek numeroj de ia bulteno — kaj jen jubileo. Tial veraj jubileoj ofte kvazaŭ perdiĝas en tiu festoinundo. En aprilo ĉi-jare, *Heroldo de Esperanto* (komence ĝi nomiĝis *Esperanto triumfonta*) festis sian 60-jaran ekziston. En majo, alia populara periodaĵo, *El popola Ĉinio*, fariĝis 30-jara kaj eldonis specialan numeron tiuokaze. Se pri datrevenoj kaj periodaĵoj, ankaŭ tiu ĉi revuo jubileos — en junio 1980, *Esperanto* fariĝos 75-jara.

Scienco

- Ekde 1972, la budapeŝta klubo Konkordo organizas ĉiumonate du sciencajn prelegvesperojn (krom dum ferioj). La 125a prelego okazis la 13an de februaro, kiam prof. d-ro O. Haszpra (vidu ankaŭ sub la rubriko "Persone") priskribis la tra-eŭropan akvovojon, kiun oni konstruas por ligi Danubon, Majnon kaj Rejnnon. La prelego enhavis ne nur fakajn sciigojn sed ankaŭ multajn interesajn detalojn pri la hidraŭlikaj esploroj ligitaj al la akvovojo. Ĝenerale, la sciencaj vesperoj celas popularsciencan pritrakton de la temoj.



- Renkontiĝoj:** La Internacia Printempa Semajno en Grésillon (Francio), inter la 6a kaj 13a de aprilo, altiris 50 infanojn kaj 20 plenkreskulojn el kvin landoj. Matene oni lernis, kaj posttagmeze ludis kaj ekskursis. La lecionoj, gvidataj je kvin niveloj, okupis ankaŭ eksterklase la infanojn, kiuj komune redaktis ĵurnalon. La ĉefa atingo estis la amikiĝo de la diversnaciaj infanoj.

Informado

- La itala liberecana revuo *La Questione sociale* aperigis specialan numeron tute en Esperanto. La redakcio estas neesperantista; sur la kovrilo, apud portreto de Zamenhof, aperas klarigo pri la decido uzi Esperanton. La speciala numero estas ilustrita, 16-paĝa kaj havebla kontraŭ 500 liroj de "La Questione Sociale", C.P. 358, I-47100 Forlì, Italio.

Feminismo

- Jam de 1979 aperas kvaronjara periodaĵo *Sekso kaj egaleco*, kiu esprimas diversajn vidpunktojn pri la virina movado kaj la vivsituation de virinoj tra la mondo. Leteroj de legantoj okupas pli ol kvaronon de la spaco. Kvankam la revuo ne temas ĉefe pri Esperanto, ĝi ne povus ekzisti en alia lingvo. Diference de nacilingvaj feminismaj revuoj, *Sekso kaj egaleco* peras interŝanĝojn de malsamkulturaj vidpunktoj pri virinoj. Redaktas Anna Brennan, p/a Nieuwe Binnenweg 197B, 3021 GA Rotterdam, Nederlando. Jarabono: 8,00 gld. aŭ 10 respondkuponoj.

Parlamenta agado

- La 6an de marto, Esperanto-Grupo de Britaj Parlamentanoj kunvenis en la parlamentejo kaj aŭskultis prelegojn pri Esperanto. Antaŭpreparis oni dissendis multajn invitleterojn kaj la kunveno estis tre sukcesa. La grupo tuj akiris kvin novajn membrojn, kaj ĝi nun nombras 108 parlamentanojn. La brita

radio elsendis intervjuon kun parlamentano kaj kun Brian Barker (komisiito pri eksteraj rilatoj de Brita Esperanto-Asocio).

Fotografio

- Sub la respondeco de s-ro Grela (Belgio), profesoro pri fotografio, okazos esperantlingva kurso pri la fotografia arto, en la franca esperantista kulturdomo Grésillon, inter la 12a de aŭgusto kaj la 1-a de septembro. Informojn petu ĉe: Kulturdomo Grésillon, F-49150 Baugé, Francio.

Unuiĝintaj Nacioj

- Sekve de la rezolucio pri Esperanto de Monda Federacio de Asocioj pri UN (v. nian februaran numeron, p. 23), Brita Esperanto-Asocio sisteme distribuas informilon pri Esperanto al la filioj de Asocio pri UN en Britio. Temas pri informilo specife direktita al tiu legantaro. BEA kaj Asocio pri UN en Britio intencas aperigi artikolojn unu pri la alia en siaj gazetoj. La du organizaĵoj ankaŭ gastigos en siaj jaraj konferencoj informbudon unu pri la alia.

Persone

Sancho-Izquierdo

- Prof. d-ro Miguel Sancho-Izquierdo, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, fariĝos 90-jara la 17an de junio. Lerninte Esperanton en 1908, li ĉeestis la 5an UK (1909) en Barcelona, kie li konatiĝis kun Zamenhof. D-ro Sancho-Izquierdo lektiis pri juro en la Universitato de Zaragoza ekde 1918, poste tie rektoris de 1941 ĝis 1954, kiam li fariĝis ĝia Honora Rektoro. Li ankaŭ estas Honora Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio.

Haszpra

- D-ro Ottó Haszpra, ĝis nun scienca vicedirektoro de la Esplora Centro pri Akvomastrumado en Budapeŝto, fariĝis en 1979 profesoro pri hidromekaniko en la Budapeŝta Teknika Universitato. Prof. Haszpra, kiu estas internacie rekonita fakulo pri la hidromekaniko, de longe agadas por la uzo de Esperanto en la scienco. Li iniciatis kaj redaktas la jaran periodaĵon *Sciencaj komunikaĵoj* kaj la regulajn sciencajn vesperojn en la budapeŝta Esperanto-klubo Konkordo (pri kio vidu ankaŭ sub "Fake").


Baur

- En sia jarkunveno, komence de majo en Bazelo, Svisa Esperanto-Societo, landa asocio de UEA, elektis d-ron Arthur Baur por sia nova prezidanto. D-ro Baur, kiu naskiĝis en 1915, doktoriĝis pri filologio kaj estas specialisto pri tiu kvara svisa lingvo — la retoromanĉa —, lernis Esperanton jam en 1931. En 1938 li redaktis *Svisa antologio*, kaj de

post 1947 li estas inter la prizorgantoj de la Esperanto-elsendoj de Svisa Radio Internacia. Pasintjare aperis lia verko *La fenomeno Svislando*.

Schulz

- Laborkomunumo pri reklamado kaj esploro de merkato kaj publika opinio, internacia organizaĵo bazita en Luksemburgo, aljuĝis sian lingvosciencan premion por 1980 al la verko *Europäische Hochsprache oder Sprachimperialismus?* (Eŭropa ko-



muna lingvo aŭ lingva imperiismo?) de Richard Schulz (FR Germanio). La transdono de la premio okazis en Luksemburgo la 3an de majo, kiam antaŭ multnombra internacia membraro de tiu organizaĵo Schulz prelegis pri la temo de sia verko. La libron eldonis Bleicher Verlag, ĉe kiu aperis ankaŭ *La perdita honoro de iu Katarina Blum*, de H. Böll, en la traduko de Richard Schulz.

18a Internacia Infana Kongreseto Stockholm 1980



PATRONO DE UEA 1980

Brazilo: Antonio de Souza Barbosa.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Britio: S.D. Maynard. Francio: Y. Guéguénat. Japanio: Y. Nukina. Usono: R.R. Andrews.

SOCIETO ZAMENHOF 1980

BRAZ: 154 Marija Pozder Almada; 155 Francisco Souza Almada; 156 Wilson Deslandes; 157 Denise Deslandes; 158 Elvira Fontes. FRANC: 159 Jean-Paul Beau. FR GERM: 160 Ruth Paintner Trumpp; 161 Margarete Schumacher. ITAL: 162 Adelaide Casetta. KAN: 163 E.W. Woodruff. SVED: 164 Karl Gustafsson. ARG: 165 Guido Alberto Schwarz. BELG: 166 André Degryse. BRAZ: 167 Carlos H. Dionisio. BRIT: 168 E.B. Knight; 169 Kenneth A. Sly.

DONACOJ 1980 (gld.) ĝis la 31a de marto

ASOCIA KAPITALO: Nederlando: Heredaĵo M. Koopmans 110,00.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: FR

Germanio: H. Welger 100,00. Japanio: Junichi Shibayama 10,00. Nederlando: I. Dijkhoff-Lenze 20,00; H. H. Weulen Kranenberg 100,00. Nordlandano 539,99. Diversaj malgrandaj 3,95. Sumo ĉi-jara 1 095,19.

FONDAĴO CANUTO: Argentino: H.A. Lingua 16,17. Sumo ĉi-jara 636,57.

FONDAĴO TEJO: FR Germanio: D. Willkommen 12,06. Sumo ĉi-jara 109,06.

ĜENERALA KASO: Aŭstralio: D. Strgačić 37,38. Britio: S. Jakšić 22,54; E.B. Knight 180,28. Diversaj malgrandaj 14,02. Sumo ĉi-jara 1 302,09.

PATRONOJ DE TEJO: 26 K. Reinisch, Aŭstrio. 27 C. Long, Britio. 28 S. Assunção, Brazilo. 29 A.S. Barbosa, Brazilo. 30 B.E. Breitenbach, Brazilo. 31 L.I. Lara, Brazilo. PROPAGANDA KONTO: Diversaj malgrandaj 1,61. Sumo ĉi-jara 10,34.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA.

Oficistino 25-jara deziras korespondi tutmonde pri kutimoj, beletro, pentroarto: Vera A. Vasiljkovskaja, ul. Volzskaja d. 2/10, kv. 91, SU-410002 Saratov, Soveta Unio.

Laktistoj kaj laborantoj en lakta industrio havos sian internacian kongreson en 1982 en Soĉi, Soveta Unio. Skribu al la tiea E-grupo ĉe la loka lakto-entrepreno: Esperanto-grupo, str. Gorkogo 87, Moloĉnij Kombinat, SU-354000 Soĉi, Soveta Unio. Klubaj koruso kaj muzikensemblo deziras samfakan korespondadon kaj interŝanĝon de kantoj kaj muzikaĵoj. Koruso "Laktisto", Poŝtkesto 264, SU-354054 Soĉi, Soveta Unio.

Esperanto en radio: Ĉu vi legis la artikolon "Kiel argumenti por pliaj elsendoj?" en la aprila revunumero? Rerigardu al tiu teksto kaj, se la dua cifero de via poŝtkodo, bankkonto aŭ pasporta numero estas 5, bonvenus, ke vi nun skribu pri Esperanto elsendoj al kelkaj radio-stacioj. Ek!

Pri aktuala temo: Kiel rilati kun move handikapitoj, aperos antaŭ la UK libreto *Ĉu ne eblas ĉi tiel?* de M. Wagemans. Ankaŭ *Ne tiel, sed ĉi tiel* (pri blinduloj) meritas atenton de tiuj kiuj lernis Esperanton ĝuste por homaj kontaktoj. Mendebla en aŭgusto.

Ĉu vi interesiĝas aŭ membras en la Eklezio de Jesuo Kr'isto de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj? Skribu! Por-Esperanta Mormonaro, University Station, Box 7222, Provo, Utah 84602, Usono.

La modernigita ortografio (sen ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ; kun q, w, x, y) ebligas akceli la ĝeneralan tutmondan agnoskon, instruadon kaj uzadon de nia lingvo. Informas: O.E.O., 24 avenue Riedisheim, F-68100 Mulhouse.

Senpagan ekzempleron de turisma revuo *La Migranto* petu de Erna Döring, poŝtfako 225, CH-4003 Basel, Svislando.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn: s-ro Mehmet Telyakar, Aydınlık sok. n-ro 23, Ortaköy-İstanbul, Turkio.

Naturistoj/Nudistoj, aliĝu al INOE, legu nian gazeton, renkontiĝu kun ni! Pli ol 200 samcelanoj atendas vin! Inf. kaj aliĝilon petu de: H. Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,80 gld. (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondas nur la anoncantoj mem, kiuj bonvolu noti, ke ni ne donas ripetrabaton por anoncetoj.

Aŭtomobile al Stokholmo? Ĉu restas libera loko en via veturilo? Se vi povus (kaj pretus) senpage veturigi volontulon de UEA al Stokholmo, sribu al la Centra Oficejo de UEA. Interesaj estas ekveturoj el Italio kaj el/tra Nederlando. Antaŭdankon!

Ekspozicio. Bezonas multe da alsenditaj bildkartoj de ĉiuj landoj, por ekspozicio, kiu okazos en nia urbo aŭguste: Alf Strømnnæss, Bekkesveien 53, N-2300 Hamar, Norvegio.

Ŝparu monon. Mendu viajn anglalingvajn librojn rekte de Anglujo. Skribu al: Language Services, 17 High Street, St. Peter's, Broadstairs.

28-jara inĝeniero deziras korespondi kun samaĝaj amikoj alilandaj. Aleksandr Belov, str. Ŝvedskaja 24-4, SU-314029 Poltava, Soveta Unio.

Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio aŭ Greklando, skribu jam sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti cirkuleron kun utilaj informoj: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Dankon pro la poŝtmarkoj, kiujn vi regule sendas al la Centra Oficejo por finance helpi al UEA. Viaj novaj sendaĵoj de uzitaj poŝtmarkoj estas tre bonvenaj, ĉiam al la adreso de UEA. Tamen, se vi estas regula sendanto, skribu foje al nia komisiito, kiu povus doni al vi gravajn konsilojn. Adreso: Fred de Geus, Radijsstraat 43A, 9741 BK Groningen, Nederlando.

Savu nin

per starigo de la
SUPERDEMOKRATA MONDORGANIZO!

♦ Esp/22

JAM DUM MULTE PLI ol 2000 jaroj oni faras torenton da senefikaj movoj kontraŭmilitaj. Tio signifas, ke ilin iniciatis laika pronularo politika, bonvolema, kiu, jes, postkuris kaj postkurigis, sisteme, belajn revojn, anstataŭ la konkretan realon. La necesa profesieco pri tiu fako ne estas anstataŭigebla per bona volo kaj bonaj intencoj. Por atingi ĝin necesas multe da tempo. Sed estis pli populare kaj senĝene, proponi iri laŭ glataj kaj ebenaj vojoj, ol surgrimpigi malfacilan vojon, kiu kondukas ĝis la pinto de la monto. Malice, kelkfoje subkonscia, ordinare venkis. Sed kion ili rikoltis? Konstante novajn amarajn seniluziigojn.


♦ Esp/23

ALMENAŬ post la severega atombombo de Hiroŝima, racio kaj saĝo postulis la starigon de vera mondregistaro, ne nur registaro blufa, kia estis la fama Ligo de Nacioj. Sed okazis la malo. Kial? Ĉar en politiko regis ĉiam la homa stulteco, ĉefe tiu de la gvidantoj, aldone al tiu de la demokrata gvidataro ĉiulanda. Kaj tio okazis ĝis nun pro manko de SUPERDEMOKRATA respondeco flanke de la politikaj gvidantoj. La gvidatoj, male, jam pagis sian

kulpon per jardekoj da teroro kaj militaj impostoj. Sed la plejparto el ili ne konscias, ke ili rezultigis tion per sia stulta konduto. Tamen ili suferis kaj pagis por esti tiel servataj.

♦ Esp/24

NE NUR la ŝtatestroj de potencaj landoj kulpas pri tio, ke ili daŭre evitis la solan efikan movon kontraŭ la eksplodo de la tria mondmilito, sed kulpas ankaŭ ĉiuj membroj de la registaroj kiuj alternis, demokrate, en tiuj landoj de post 1945. Fakte, ili ĉiuj baris kaj daŭre malhelpis la starigon de vera MONDREGISTARO, kiu devus mastri nur super la politikaj registaroj, ne super la popolamasoj, kiuj decidas nenion. Tio estus movo efika! Ili baris kaj konservis tiun baradon por misservi la enorman amason de la laikaro politika, per starigo de la senpova UN. Ili ne hontis pro sia malkapablo lerni el la misrikolto de la analoga blufa – LIGO DE NACIOJ. Ili trompis, malice, la vastan amason de politikaj laikoj, ŝajnigante, ke tiu kartona ŝildo estas bronza.



MONDHARMONIIGA INSTITUTO
VIA SPORT 18, I-40065 PIANORO, ITALIO

22a de julio-11a de aŭgusto
en GRESILLON
ESPERANTO LERNADO

. rektmetoda kurso
. grupa praktikado
. perfektigo
. studado de tekstoj



dum
KAMPARA
LIBERTEMPO

informoj,
aligoj:

esperantista kulturdomo
kastelo Grésillon
49150 BAUGE Francio

ĈU VI JAM MALKOVRIS ĈI TIUN
UNIKAN PERIODAĴON EN LA
INTERNACIA LINGVO?

MONATO

internacia magazino sendependa

Eldonanto: Torben Kehlet / STAFETO
Ĉefredaktoro: Stefan MAUL

40 paĝoj DIN A4 — riĉe ilustrita
11 kajeroj jare

Jara abono: 49,50 gmk aŭ 880,- b.fr.
La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/STAFETO, Heideweg 20, B-2120 Schoten. Belgio. Poŝtĉekkonto je la nomo de la eldonejo estas: 000-0422856-33.

Se vi ankoraŭ ne estas abonanto de "MONATO", petu provekzempleron kontraŭ du internaciaj respondkuponoj. (Vi tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton). Antaŭdankon!

INVITO


LA 2a PACIFIKA KONGRESO

HONORA PATRONO — PROF. RALPH HARRY

La Kongreso okazos de la 26a ĝis la 29a de julio 1980 en Universitato de Brita Kolumbio, Vankuvero, Kanado.

Samtempe (kaj samloke) estos ankaŭ la kongresoj de la landaj asocioj de Kanado (KEA) kaj Usono (ELNA).

Antaŭkongresa kaj postkongresaj ekskursoj estas aranĝitaj. La plej populara el ili estas la Postkongresa Ekskurso n-ro 2, dum 6 tagoj (30a de julio — 4a de aŭgusto), kiu kondukos tra la bela Brita Kolumbio (Kamloops, Rocky Mountain ŝtatparkoj Banff, Jasper, Yoho kun 12 972 futojn alta monto Robson, Lago Okanagan). Vojaĝo per



hotelmobilo — aŭtobuso, kiu per speciala aranĝo fariĝas nokta tendo. Kosto: Kan.\$ 245 por persono, inkluzive ĉiujn manĝaĵojn kaj dormosakojn.

Por aliĝilo skribu al: Dua Pacifika Kongreso de Esperanto, 373 Guilby Street, Coquitlam, B.C., Kanado, V3K 3Y5.

ABZ de amo estas havinda popularsciencia verko por ĉiu

Ĉi tiun 274-paĝan enciklopedion de la seksa vivo verkis danaj psikologoj Inge kaj Sten Hegeler, kaj tradukis Ib Schleicher kaj August Weide.

Formato: 25cm. Ilustrita. Bindita per ledoimita plasto. ISBN 87 87089 09 2.

Prezo: 33,78 (por Nederlando 35,13) gld. plus 10% por la sendokostoj. Por samtempa mendo de minimume 3 ekz., UEA donas 33-procentan rabaton.

Mendu ĉe: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.


Nova periodaĵo por ĉiu serioza esperantisto:

Ekonomia Bulteno pri Usono

prezentas INFORMOJN, ANALIZOJN, KLARI-
GOJN pri granda kaj grava lando.

Jarabono: US\$ 8.— (12 numeroj); provekzemplero kontraŭ 1 irpk. Adreso: 7008 Millwood Road, Bethesda, Maryland 20034, Usono. Abonebla ankaŭ ĉe la Libroservo de UEA: 18,00 gld. jare.

Ĉu vi valoras la libron?



Du mil homoj jam aĉetis la libron, ĉar...
"Ĝis plibonigenda reeldono aŭ apero de Enciklopedio, ĝi estas la plej bona kaj plej informriĉa libro iam ajn verkita pri la Internacia Lingvo." M. Duc Goninaz

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA/CED, 1974. 876p. 20,5x14cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indekso-paĝoj. ISBN 92 9017 016 6. Prezo: 84,00 (por Nederlando 87,36) gld., plus sendokostoj 10%.

Pensu pri beleco

de viaj korespondaĵoj kaj uzu la belan glumarkon de la 65a UK en Stokholmo. Kiel kutime, ĝi estas trikolora, sed escepte alloga ĉi-jare. Cent glumarkoj kostas 8,25 (por Nederlando 9,60) gldenojn, kio inkluzivas la sendokostojn. Mendu ĉe la Libroservo de UEA aŭ ĉe via kutima libroliveranto.

